

Turka Stelo



SALUTON,

Somero finiĝas kaj printempo alproksimiĝas. Homoj revenas hejmen el siaj someraj ferioj kie ili troviĝis en amasoj da homoj kaj infektiĝis pli kaj pli pere de la kronviruso. Eble en printempo la kvara ondo pintiĝos pli kaj pli kaj denove okazos enfermiĝoj.

Do restu hejme kaj legu nian revuon. La 69-a numero de Turka Stelo revuo denove enhavas multajn kaj diverstemajn artikolojn el diversaj landoj tra la mondo. Sen niajn kontribuantoj Turka Stelo ne povus realiĝi. Do ni dankas ilin elkore.

En ĉi tiu numero kelkaj el la tre interesaj artikoloj estas:

- pri kino kaj ĝia historio: Tempo Sigelita
- la mitologia rakonto: AĤILO kaj POLIKSENA
- la intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski kun Renato Corsetti
- la rakonto pri: Henry de Montherlant
- la novelo: Albana mor-kodo

- la historio pri: Nicolò de Malte'
- la humuraĵo: Mi vizitas samideanojn
- la daŭrigaj rakontoj "La Kímero" kaj "La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj"
- artikolo el la retejo UEA.FACILA
- konkursaĵoj el la EKRA2021 konkurso
- multaj poemoj
- ŝercoj kaj krucvortenigmo
- kaj multaj aliaj

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
REGOLO KAJ REĜO	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Renato Corsetti: La movado elvenos el ĉi tiu periodo pli rezistokapabla ol antaŭe	4
Tempo Sigelita	5
AĤILO kaj POLIKSENA (ΑΧΙΛΛΕΥΣ και ΠΟΛΥΞΕΝΗ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
La Kimero - Rakonto el la estonteco (15)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	12
Akvofalo kaj Rivereto	13
Henry de Montherlant	13
Albana mor-kodo	15
Salutante Turkion el Kanado!	17
Nicolò de Malte'	18
Ŝercoj	19
Krucvortenigmo	19
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (5)	20
EKRA2021 - Poezio - Espopore	21
	23
Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo	24
Hobojisto en Istanbul	25
"Biciklo estas lanta morto de la planedo"	26
FERVOJSTACIO	26
La malsaĝa tigro	27
Kataj historioj	28
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo. Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Participloj
- 3/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

REGOLO KAJ REĜO

Estas iu regolo,
kiu ne ŝatas regulon.
Volas ĉiam flugi,
manĝi, dormi kaj ludi.



Havas li neston
apud reĝ` ĝardeno.
Konstruis ĝin bele
per herbo, ŝnuro kaj
greno.

Estas li plej feliĉa
Vivante sen mono.
Malfeliĉe reĝo sentas
malgraŭ oro kaj krono.

Ne povas dormi reĝo
dum la nokto silenta.
Dormegas pace regolo
en lia nesto herba.



Do kion vi volas fariĝi?
Reĝo aŭ regolo?
Profunde pensu unue,
vivu sen doloro.

verkis kaj sendis **Gairik Patranobis**
el Barato

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La septembra sumoo okazos de la 12-a ĝis la 26-a de septembro.

Esperanto-Sumoo estis elpensita por ke esperantistoj legu esperantajn librojn. Dum la tempo, kiam dikaj sumooistoj luktas en Japanio, ni esperantistoj legas esperantajn librojn. Antaŭ la aranĝo ni elektas libron, kiun ni legos kaj decidus kiom da paĝoj ni legos ĉiutage. Se ni plenumas nian tagan taskon, ni havas unu venkon. Tiamaniere ni luktadas 15 tagojn. Sumooistoj en Japanio luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed ni esperantistoj luktas nur kontraŭ malfortoj de sia propra personeco.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 976 (2021-08-16)

9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

UEA invitas ĉiujn kantemulojn partopreni la 9-an eldonon de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj [...]

N-ro 975 (2021-08-14)

Forpasis NANOVSZKY György (1942-2021)

NANOVSZKY György naskiĝis en Budapeŝto, la 10-an de aprilo 1942, kaj forpasis tie la 10-an de aŭgusto 2021. [...]

N-ro 974 (2021-08-13)

Deklaro de TEJO kaj UEA okaze de Internacia Junulara Tago, 12 aŭgusto 2021

En 1999, la Ĝenerala Asembleo de UN (RES 54/120) aprobis "la rekomendon de la Monda Konferenco de [...]"

N-ro 973 (2021-08-12)

Invito al ILEI-simpozio

UEA kore invitas ĉiujn partopreni la virtualan simpozion de ILEI "Esperanto en universitataj medioj - nuntempo kaj estonteco" [...]

N-ro 972 (2021-08-09)

Nova membro de la Honora Patrona Komitato de UEA: Prof. Marco Lucchesi

Dum la fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 24-an de julio 2021 [...]

N-ro 971 (2021-08-07)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, 9 aŭgusto 2021

Okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, la 9-an de aŭgusto 2021, Universala Esperanto-Asocio salutas [...]

TEJO



2021-08-12

Internacia Junulara Tago 2021

En 1999, la Ĝenerala Asembleo de UN (RES 54/120) aprobis «la rekomendon de la Monda Konferenco de Ministroj de Junularo (...), ke la 12-a de aŭgusto estu deklarita Internacia Junulara Tago». La starigo de tiu grava tago estis rimarkinda, [...]

2021-08-11

IJK 2021 en la reto

294 homoj partoprenis en IJK 2021, la Internacia Junulara Kongreso, kiu por la dua sinsekvaj jaro okazis en la reto. Por la unua fojo dum reta TEJO-evento, oni uzis la platformon kun luda interfaco Gather.town. TEJO dankas ĉiujn partoprenintojn [...]

2021-08-06

Estraro de TEJO 2021-2022


La Komitato elektis la Estraron de TEJO por la mandato 2021-2022! La nova teamo ekoficos la 1-an de Septembro. Agrablan kunlaboron kaj sukcesan agadon! Prezidanto: Léon Kamenický Vicprezidanto: Albert Stalin Garrido Vicprezidanto: Inès Kahin Ĝenerala Sekretario: Rogier Huurman (Roĉjo) Kasisto: Veronika Venislovas Estrarano: Valentin [...]

Leteroj de niaj legantoj



Saluton,
Mi kore dankas pro la sendado de TS. Nun estas pluvsezono ĉe ni. Preskaŭ ĉiam pluvas kun fulmoj kaj tondroj. Mi timas iri eksteren, ĉar dum la lasta unu monato pli ol cent homoj mortis pro la fulmoj. Oni ne povis fari ion por protekti la vivojn de homoj, precipe tiujn, kiuj laboras en la agrikulturaj kampoj. La kronviruso ankoraŭ restas kun ni. Tial mi ne iras eksteren. Mi povas labori el mia domo kaj legi TS revuon. Al mi multe mankas Esperanto libroj. La librojn kiujn mi havas malmultas, kelkfoje relegitaj. Do mi kore redankas pro la TS revuo. Ĝis.

Gairik Patranobis el Barato



Dankon, por la nova numero de TS!
Kaj jes, merhaba, tiun vorton ni iam uzis dum nia libertempo en Turkio :-)
Amike

Fejfi el Slovakio



Kara redaktoro de Turka Stelo,
Mi volas informi vin, ke mi devas ĉesi legi vian revuon, ĉar ĝi estas tro interesa kaj tro longa, kaj do oni devas elekti inter ĝi kaj promenado en la brita somera pluvo. La promenado estas rekomendita de la kuracisto kaj mi kredas, ke kuracistoj ankoraŭ ne agnoskas la kuracajn efikojn de Turka Stelo. Sed venos tempo ankaŭ por tio.
Amike

Renato Corsetti el Britio



Karaj,
Elkoran dankon por la nova numero de Turka Stelo, kiu aperas tiel regule la lastan tagon de la monato! Ankaŭ por la aperigo de alia rakonto de mia amiko verkisto Zija! Ĉi lasta denove esprimis sian dankemon al vi!

Ĝis

Bardhyl Selimi el Albanio



Saluton kaj koran dankon pro la monata sendado de ,kiel kutime bunta, Turka Stelo .
Vintro invitas al legado apud hejtgilo
Amikajn salutojn

Franciska Toubale el Aŭstralio



Kara sinjoro,
Unue mi ŝatus gratuli vin pro via revuo, kiu havas tre altan nivelon. Mi legas ĝin ĉiumonate kun granda intereso. Mi permesas al mi sendi al vi malgrandan tekston pri mia sperto ĉe la Istanbula Operejo antaŭ 50 jaroj.

Mi salutas vin kore

Axel Vincent el Francio



Estimataj amikoj,
koran dankon pro la regula sendo de via bela kaj interesa revuo. Mi deziras al vi fruktodonan laboron kaj sukceson sur la kampo de Esperanta kulturo.

Kore kaj estime,

Julius Hauser el Slovakio

Renato Corsetti: La movado elvenos el ĉi tiu periodo pli rezistokapabla ol antaŭe

-- el La Ondo de Esperanto

La 29an de marto 1941 naskiĝis Renato Corsetti, eble la plej aktiva esperantisto en la du lastaj jardekoj. Okaze de ĉi tiu datreveno Paweł Fischer-Kotowski, vicredaktoro de La Ondo de Esperanto, intervjuis la jubileanton.

Vi aktivas por la Esperanto-movado jam pli ol duonjarcenton. Kiam vi eklernis la lingvon, la mondo estis tute alia: la unua homo sendita en la kosmon, flugo al la luno, seksa revolucio kaj amasaj protestoj kontraŭ la usona-vjetnama milito. Ankaŭ en Esperantujo: UEA kun pli ol 30 mil membroj (el kiuj pli ol sep mil individuaj membroj) estis gvidata de Ivo Lapenna, al la unua azia UK (50a UK, Tokio, 1965) aliĝis pli ol 1700 personoj. Jen mondo de espero, kie ĉio eblas, ankaŭ la fina venko.

Vi pravas. Esperanto ne vivas en vakuo, sed ĝi

estas firme ligita kun la ĉirkaŭa socio. Ĉu ĝi ne naskiĝis pro la pogromoj en la Ruslanda imperio? Ĉu ĝi ne disvastiĝis en la kadro de la esperoj pri pli bona mondo de duono de la tiama socio, dum la alia duono pluportis la naciismon de tiu jarcento al la kulmino de la Unua Mondmilito? Ĉu ĝi ne organiziĝis samtempe kun la pac-movado kaj prosperis sur la ondoj de fido al la scienco, kiu savos la mondon?

Kiam mi estis juna, Eŭropo travivis periodon de grandaj esperoj pri la estonteco kaj de grandaj sociaj ŝanĝiĝoj. Ekzemple, mi apartenas al la unua generacio >>>29



LA AVENTUROJ DE PRINCO AHMET (CHAR) LOTTE REINIGER FILMO

Sed kia filmo! Ĝi ankoraŭ konkurencas kun la hodiaŭaj altteknologiaj filmoj. Tiom nova kaj mirinda! Unu el la bonegaj kaj ankoraŭ supritaj filmoj, kiujn la germana kinejo donacis al la mondo, estas "Metropolo" kaj la alia estas "Aventuroj de Princo Ahmet". Ambaŭ estis prezentitaj al la publiko preskaŭ en la sama jaro.



Nun ni parolu pri kia teĥniko uzis Lotte Reiniger!

La adoranto de "ombro-teatro"

kaj "orientaj fabeloj" Reiniger uzas haltu-movu teĥnikon en ĉi tiu filmo; tio estas, ŝi uzis paŭzan filmadon kaj eltranĉan metodon. Estas facile verki tion, sed malfacile fari. Tiutempe ankoraŭ estis nek la industrio de Walt Disney, nek la komputilaj animacioj



(Mickey Mouse estis kreita en la jaro 1928)... Li fotis unu post la alian figurojn, kiujn ŝi eltranĉis el papero per tondilo, kaj movigis ilin. Ĉi tiuj fotoj vigliĝis, kiam ili venis unu post alia, kaj kun la lumaj kaj fonaj ŝanĝoj kaj la Trickisch-teĥniko, kiu estis



ŝia propra invento, por ke la 2-dimensiaj objektoj akiru 3-dimensiajn trajtojn. Reiniger kreis dekojn da figuroj



ŝia propra invento, por ke la 2-dimensiaj objektoj akiru 3-dimensiajn trajtojn. Reiniger kreis dekojn da figuroj

tranĉante ilin el nigra kartono, kaj la filmo, produkto de ĉi tiom da peno, eniris en la historion de la monda kino.



La "Aventuroj de Princo Ahmet" estas konsiderata la plej malnova desegnofilmo. Laŭ iu fonto (animasyongastesi.com): "... Oni scias, ke la itala naskita direktoro Quirino Cristiani filmis du longajn animaciajn filmojn en Argentino antaŭ ĉi tiu filmo. Kvankam la filmo "El Apostol" el la jaro 1917 kaj la filmo "Sin Dejar Rastros" el la jaro 1918 estis la unuaj desegnofilmoj, neniu kopio de ili postvivis ĝis nia tempo. Bedaŭrinde neniu kopio ankaŭ de la animacia filmo "Peludopolis" el la jaro 1931, filmita de Quirino Cristiani, postvivis."

La sukceso de Reiniger ne estas hazarda. Ni rigardu ŝian biografion kaj kion ŝi diras!

Lotte, naskita en Berlino en la jaro 1899, priskribas sian propran vivon per siaj propraj vortoj:

"Kiam mi estis en la lernejo, ĉiuj infanoj kutimis eltranĉi paperojn por fari siluetojn. Mi enamiĝis al ĉi tiu laboro. Dum la aliaj infanoj ludis ekstere, mi vigligus la siluetojn, kiujn mi eltranĉis el papero, kaj kreus kun ili teatraĵojn kiel tiu de Neĝulino. Kreskante, miaj gepatroj ankaŭ ekĝuis mian hobion. Mi sidis hejme, trankvile ludante kun miaj siluetoj, konstruante mian propran ombro-teatron."

"Kiam la kinejo estis inventita, mi demetis mian ĉapelon al ĉi tiu invento. La plej interesaj fantaziaj filmoj, kiujn mi memoras, estis tiuj de George Méliès, kiujn mi spektis en la jaro 1915. Mi spektis prelegon de Paul Wegener, kiu filmis la filmon "Golem". Li priskribis la teĥnikan parton de la laboro, la specialajn efektojn, kiujn mi trovis ilin tre fascinaj. Mi havis nur dek kvin jarojn tiam. Mi diris al mi, "Mi devas renkonti ĉi tiun viron". Mi fariĝis membro de la Reinhardt Teatro-Lernejo. Li tre zorgis pri mi, lasante min fini la malgrandajn partojn de sia filmo.

En la jaro 1918, Wegener prezentis min al grupo de junuloj. Ĉi tiu grupo ĵus komencis labori en scienca kaj eksperimenta studio. "La Ornamaĵo kun Ammalsana Koro" estis farita per siluetoj. Ĝi estis montrita en kinejoj kvankam ĝi daŭris nur kvin minutojn."

En la aĝo 23, Lotte komencis labori pri sia unua animacia longdaŭra filmo. Inter la jaroj 1923 kaj 1926, Reiniger kaj ŝia edzo Carl Koch kune kun animaciistaj asistantoj Walter Rutmann, Bertolt Bartosch kaj Alex Kardan, kreis "La aventuroj de princo Ahmed". Ĉi tiu filmo estis vere unua. Ĝi publikiĝis antaŭ la filmo "Neĝulino kaj la sep nanoj" de Walt Disney. "Princo Ahmet" estis fabelo kaj kvankam ĝi baziĝis sur la

Estas jam mult-foje dirite eĉ pruvite, ke la plej granda forto en la vivo estas la amo, precipe la erotika impulso de la homoj, kiu ĉion difinas kaj ĉion regas. En la sentempa paseo de la homa estado, la granda estro de ĉio estas la amo, la unua dominantulo de la surtera vivo. En la belaj helenaj mitoj, kreitaĵo kaj knedaĵo de la homa intelekto, sentoj kaj instinkto, preskaŭ ĉiam ĉefrolulo estas la amo.



Ekzakte el tio komenciĝas nia ĉi-tiea rakontado, ĉar iam estis Peleo (Πηλεΰς), la tre bela, varmegsanga, juna reĝo de Ftio (Φθία), patrujo de la Mirmidonoj (Μυρμιδόνες), de plej kapablaj, preskaŭ nevenkeblaj helenaj militistoj. Tiu, do, Peleo, sentante ian neeksplikeblan deprimon, iun printempan nokton vagadis tute sola sur la lumlumata marbordo. Subite, kvazaŭ fulmobatita li haltis kaj sin kaŝis malantaŭ roko. Tio, ĉar, iom pli malproksime, kelkaj junulinoj, evidente nereidinoj, dancadis kaj ĝoje ludadis ĝuante la strange helan lunlumon. Peleo, per la unua rigardo distingis inter la junulinoj belulinon, kies aspekto, kvavaŭ mortiga sago, batis lian bruston. De tiu nokto, la juna reĝo ne povis trovi trankvilon, li estis vere malfeliĉa. Post kelkaj tagoj, en tre malbona stato, li aliris al sia bona amiko, al la centaŭro Kirono (Χείρων), la konata en la tuta Helena lando plej granda saĝulo. Li rakontis al li kio okazis, pro kio li suferas kaj petis pri lia konsilo. La saĝa centaŭro diris al li, ke objekto de lia ampasio estas Tetisa (Θέτις), la plej bela nereidino, kiu, tamen, havante diajn fortojn ne povos esti facile konkerebla, ĉar, krom ĉio alia, ŝi povas ŝanĝi formon. La saĝa centaŭro donis taŭgajn konsilojn al sia amiko kaj tiu lasta, la unuan nokton de plenluno embuskis kaj kiam la nereidinoj venis sur la marbordo, li sin ĵetis sur Tetisan, li surprizis kaj kaptis ŝin forte. La junulino kontraŭstaris, luktis, ŝi ŝanĝis multajn formojn, ŝi iĝis serpento, leono, fajro, tamen Peleo tenis ŝin forte, tiel, ke ŝi fine cedis, ŝi allasis sin, ĉu devige, ĉu ne, ŝi kuniĝis kun li, ŝi iĝis lia edzino.

La amhistorio kaj ligiteco de tiuj du personoj, tre bela kaj interesa, postulas apartan rakontadon, ĉi tie nin interesas tio, ke de tiu kuniĝo devenis, naskiĝis Aĥilo, la temerara, nevenkebla militisto, la plej granda helena heroo en la epoko de la troja milito. Komandante la armeon de la temeraraj Mirmidonoj, Aĥilo partoprenis la tuthelanan militiron kontraŭ Trojo (Τροία), kaj dum tiu longa milito li estis la ĉefa forto de la helena flanko, la plej granda timo de la kontraŭuloj.



La sieĝado de Trojo daŭris tre longe, tamen ĝi ne povis esti tre strikta, ĉar la Trojanoj ne restis kaŝitaj malantaŭ la nekonkereblaj muregoj de sia metropolo, ili ĉiam estis batal-pretaj sur la etendita, tre vasta ĉefa batalkampo, sur kiu okazis de tempo al tempo kruelaj, tamen ne longedaŭraj kaj ne decidaj bataloj. Estis milito de taktiko, en kiu la kontraŭuloj provis la unu la eltenemon kaj rezist-povon de la alia. Multaj, tre signifaj militistoj el ambaŭ flankoj falis en tiuj ne oftaj, sed sovaĝaj kaj sangaj bataloj, tamen la grandaj herooj, la plej danĝeraj por la kontraŭuloj militistoj, la grandaj atutoj de ambaŭ flankoj, post preskaŭ dek jaroj jam, vivis ankoraŭ kaj ties esto difinis la futuron, kaj finon de la milito. En la flanko de la Trojanoj tiu ĉefa forto estis Hektoro (Εκτωρ), la unua filo de la troja reĝo Priamo (Πρίαμος), terura, temerara militisto, ĝenerala estro de la tuta troja armeo. Li estis viro prudenta, serioza, la ĉefa kuraĝinspiranto kaj vigliganto de siaj kunmilitantoj, en ĉiu kriza fazo de la milito. En la alia flanko, tia, same granda milita forto, estis tiu Aĥilo, viro, laŭ la karaktero orgojla, fierega, flamiĝema, militisto eksterordinare forta kaj lerta, riskema, tute sentima, kaj tiuj liaj ecoj kaj karakterizaĵoj konsistigis tuton danĝere eksplodeman, ne nur por liaj malamikoj.

Transe de la troja ĉefurbo etendiĝis la apudmonta regiono de Trojlando, kiun la Helenoj ne povis atingi por ĉirkaŭsieĝi la metropolon, ĉar tie estis ne nur Trojanoj, sed ankaŭ nekonata nombro da militemaj montanoj, subuloj de Trojo, kiuj ne permesus aliron al sia monta teritorio. La Helenoj, do, ne dezirante malfermi duan batal-fronton, eĉ tiom malproksime de sia kampadejo kaj ŝipoj, ne riskis sin turni al tiu nekonata, sovaĝa regiono, kiun la milito ne tuŝis kaj en kiu la vivo daŭrigis sian ordinaran iradon. La agroj estis kultivataj, la gregoj paŝtataj, kompreneble ĉio tio ĉi okazis sub la sendorma gardado de bone organizita reto da trojaj kaj lokaj armitoj, spionoj kaj heroldoj.

Mi diris, ke la Helenoj ne aŭdacis atingi tiun danĝeran teritorion, tamen tio ne koncernis la

kapriĉumoran Aĥilon, kiu nur pro sia propra amuziĝo, de tempo al tempo, tute sola aŭ akompanata de tre malmultaj, same riskemaj, kunuloj, entreprenis embuskojn en tiun malamikan teritorion, dum kiuj li ion detruis, ion forprenis, iun forrabis aŭ mortigis. Krom ĉio alia li estis tre rapidpieda kaj tre kapabla en la kamuflado, do, al li ĉio neebila ŝajnis kaj estis facila. En iu tia lia embusko, kaŝite kaj bonege kamuflite apud fonto, li ekvidis rajdantan junulon, senlipharan adoleskanton, kaj junulinon, kiuj gaje babiladis kaj senzorge ridadis. Aĥilo, ekvidinte la junulinon, subite sentis ion nekonatan, ian strangan, tre plezuratan pikon sur la brusto. La gracio kaj beleco de la knabino perforte atakis, skuegis la malmolan koron de la kruda, sovaĝa militisto. Aŭdante tute klare iliajn parolojn, li komprenis ke la knabo estas Troilo (Τρωίλος), la plej juna filo de la troja reĝo kaj la bela knabino estas Poliksena, la plej juna reĝidino. Aĥilo, por la unua fojo ne sciis kion fari, li avida rigardadis la belulinon, li deziris engluti ŝin per sia rigardo, li sentis neeksplikeblan, pasian deziregon, li iom moviĝis kaj tiam la junulino ekvidis lin kaj komencis freneze kriegi. Aĥilo ekstaris kaj lia majesta kaj samtempe terura aspekto kaŭzis ankoraŭ pli fortan timon, ankoraŭ pli fortajn ekkriojn. La rajdanta junulo, same timigita alproksimiĝis al sia fratino, li etendis sian manon por ŝin helpi surĉevaliĝi, sed ŝi ne povis ĝustatempe salti, do, ŝi batis la ĉevalon, ŝi kriis, ŝi admonis sian fraton forkuri, dum ŝi komencis kuri al la kontraŭa direkto. Aĥilo restis en momenta embaraso, tamen lia militista instinkto puŝis lin al persekutado de la rajdanto. Kurante kiel fulmo, li atingis la malbonsortan junulon, li ekkaptis, li tiris lin surteren kaj per unu movo de sia ponardo li senkapigis lin! Tuj poste, konsciinte la teruraĵon kiun li faris, sin turnis al la direkto de la junulino, apud kiu, tamen, kuris jam granda grupo da armitoj, verŝajne altiritaj de ŝiaj krioj. Aĥilo hezitis, li estis sola kaj tre malpeze amrita, sed li ne povis tiriĝi foren de la belulino, kies vizaĝo, kvazaŭ nevidebla kaptilo, tiris lin al ŝi. Tamen, li ekaŭdis la sonon de kornoj, la bruon de galopado, li rekonsciiĝis, li fulme kuris foren! Li atingis sian kampadejon alportinte nenion, krom la dolĉa doloreto, kiu de tiu tago agrable tikladis lian bruston.

Poliksena, nur multajn tagojn post la fatala, malfeliĉiga tago, povis por la unua fojo revenigi en sian menson la bildon de tiu nekonata, terura viro. Ŝi reprezentadis en la menso ne la okazaĵon, sed precipe siajn terure spertitajn sentojn, ŝi konsciadis, ke la memoro de tiu sovaĝa, giganta Heleno ne kaŭzis al ŝi nur la abomenon, kiun ĝi devus kaŭzi. La delikata virgulino ne povis ekspliki la stangaĵon, ke pensante pri



tiu terura viro, ŝi sentis ian konfuzivan, preskaŭ plezuratan agaĉon kaj maltrankvilon. La sekvintajn tagojn, kun timo ŝi konsciis, ke ŝi devas multe klopodi por peli, por viŝi de sia penso la bildon de tiu viro kaj tio superis sian komprenpovon.

Sekvis tre seriozaj okazaĵoj, sekvis bataloj fortaj, la milito subite ricevis pli violentan direkton. Unue falis en batalo Patroklo (Πάτροκλος), la, de la plej frua infaneco, plej bona amiko de Aĥilo, lia kunulo, kamarado, preskaŭ lia frato. La malĝojo de la heroo estis neeltenebla, la funebro de la Mirmidonoj, kiu en la komenco profundigis ĉion en silenton, post nelonge kondukis al veoj kaj malbenoj, vekis la plej teruran, senbridan koleron de Aĥilo, lian nekvietigeblan ŝoifon por kiel eble plej severa, tuja venĝo. Ĉiutage li prezentis sin sur la bataalkampo. Sekvate de la batalemaj Mirmidonoj, tute ne sentante la terurecon de la danĝero, li enmiksiĝis en riskajn embuskojn, atakojn, sturmojn, en varmegajn batalojn kontraŭ multaj samtempe kontraŭbatalantoj, li senriproze, senhalte bataladis, mortigadis, amasbuĉadis la kontraŭstarantojn, havante ĉiam en la menso sian plej malamindan malamikon, la mortiginton de lia amata amiko, Hektoron, la armeestron de la Trojanoj. La Trojanoj estis en daŭra konfuzo, la viktimoj de la ĉiutagaj bataloj estis pli kaj pli multaj, multaj kuraĝaj militistoj falis la unu post la alia, la oficiroj ne plu povis kuraĝigi siajn virojn, multaj malmultaj militistoj restis malantaŭ la murego, ili ne aŭdacis eliri al la kampo. Nur unu ne timis, nur Hektoro ne timis, ĉar li bone sciis, ke li povas venke kontraŭstari al ĉiu ajn kontraŭulo, eĉ al Aĥilo. Dezirante kuraĝigi siajn subalternulojn, li lasis siajn komandantajn projektojn kaj la strategiajn taskojn kaj li mem kondukis armegrupejn el elektitaj, spertaj militistoj al riskaj operacioj, ĉiam serĉante sian grandan kontraŭulon. Post nelonge la ekvilibro estis firmigita, la trojanoj reakiris sian kuraĝon kaj batalforton, tamen tio ne daŭris longe. Ne daŭris longe, ĉar venis la tago, en kiu la du grandaj herooj, Aĥilo kaj Hektoro staris la unu kontraŭ la alia. Estis la plej kriza momento de la longa, proksimume dekjara jam, milito. La kunuloj de la du herooj retiriĝis, estis duelo, duelo de honoro inter la du

plej fortaj, plej brilaj kaj famaj militistoj. Ĉio silentis, ŝajnis, ke la tuta naturo atendis la signalon de la dioj. Jes, la homoj estis streĉintaj siajn pensojn, sian atenton, al la dioj, kiuj tamen estis en konfuzo. Ĉu dia konfuzo? Jes, tio, ĉar la grandaj dioj, dum la tuta daŭro de la milito, estis disiĝintaj en du partojn. Kelkaj el ili subtenis, eĉ kelk-foje protektis kaj kaŝe helpis unu flankon, dum aliaj faris la samon favore al la kontraŭa. Ĉio okazis kaŝe, ĉar Zeŭso (Ζεύς), la direĝo, severe malpermesis rektan enmiksiĝon de dioj en la militajn aferojn de la mortemuloj. Malgraŭ tio, tiun krizan momenton la plej potenca diino, Atena (Αθηνά), protektanto de Aĥilo, ne obeis al la patra ordono. Ŝi unue trompis Hektoron, kiam, ricevinte la formon de lia frato Deifobo (Διήφοβος), fantome prezentiĝis kaj staris apud li. La spektantoj ne vidis tion kaj kiam Aĥilo levis kaj fortege ĵetis sian pezan lancon, kaj kiam ĝi ne trafis sian kontraŭulon, leviĝis krioj, veaj el la flanko de la Helenoj, ĝojaj el tiu de la Trojanoj. Tamen, ankaŭ la lanco de Hektoro maltrafis kaj tiam, mirakle, en la mano de Aĥilo estis dua lanco, nevidite donita al li de la nevidebla diino. Kaj kiam Hektoro sin turnis al sia frato kaj etendis la manon por preni ties lancon, li vidis, ke apud li estas neniŭ! Nur tiam, la granda heroo ekkonsciis, ke li estas kondamnita de dio, tamen li ne povis fari duan penson, la lanco de Aĥilo trapenetrus lian kirasaon, lian bruston, la brila viro falis!

La plezuro de la tuta mondo plenigis la violentan Aĥilon kaj dum kiam malantaŭ la muregoj de Trojo eksplodis korŝira lamentado, li ligis per rimenoj la mortintan kontraŭulon post sia ĉaro kaj trenante lin surteren, faris triumfan cirkliradon sur la bataltereno. Tuj poste, li iris al sia kampadejo, li ĵetis kaj lasis la mortinton ekster sia tento kaj ordonis la Mirmidonojn komenci la festenon. Kaj la amuziĝo daŭris tagojn, kaj la kadavro de la troja granda heroo restis ne enterigita, forĵetita en la koto. Tamen, tio estis kontraŭa al la neskribitaj leĝoj de la milito, kontraŭa al ĉia morala regulo. La maljuna troja reĝo, per senditoj petis, petegis, oferis grandegan elaĉetaĵon, tamen Aĥilo ne liveris la valoran kadavron. Tamen, la tia sinteno ĝenis la diojn, Zeŭson mem, kiu ne povis permesi tian profanan konduton. Do, Tetisa prezentiĝis en sonĝo de sia filo kaj konsilis lin cedi kaj liveri la kadavron de Hektoro al lia patro. Aĥilo obeis, sed, dezirante humiligi ankoraŭ pli multe la trojan reĝon, postulis ke li mem venu, nokte, akompanate de nur unu persono, al la kampadejo de la Mirmidonoj, por doni la elaĉetaĵon kaj preni la kadavron. Ĉio tiele okazis, kaj ĉar la reĝo estis maljuna, malsana kaj tiom severe hardita, li bezonis daŭran prizorgon kaj flegadon. Tial, estis decidite ke la maljunulo devas esti akompanata de sia plej juna kaj plej amata filino, Poliksena.



Estis la respektindeco de la afliktita, maljunulo, la aspekto de la malfeliĉa patro, kiu kovris la majestecon de la fiera reĝo, estis ja tio, sed pleje estis la, kvazaŭ mirakla, prezentiĝo de la bela junulino, de tiu neforgesita junulino, kiu subite pikis la koron de la orgojla militisto kaj vekis la komplikajn sentojn, kiuj, antaŭ kelka tempo, tiom multe suferigis lin. Eble estis ĉio tio ĉi; la sovaĝa viro tute ŝanĝis intencon kaj sintenon, humile, kompleze bonakceptis la maljunulon, unue li rifuzis, malakceptis la alportitan elaĉetaĵon, ceremonie li oferis al li decan al la plej respektindaj vizitantoj vespermanĝon kaj kaŝe donis ordonon, ke oni atente lavu, prizorgu, bandaĝu la kadavron, por ke ĝi estu liverita en kiel eble plej bona stato. Bruaj, perfortaj sentoj batadis la koron de Aĥilo, la figuro de la tiom dezirata virino malsovaĝigis, mildigis liajn rigardojn kaj parolojn. Li iĝis ĝentila, galanta, milda. Io preskaŭ simila, sed apenaŭ sentebla, ia obtuza plezuro, ne eksplikebla, ne komprenebla, piketis ankaŭ la delikatan koron de la hontema, sensperta knabino, kiu, per la unua rigardo, rekonis tiun sovaĝan militiston, kiu estis postkurinta ŝin, la viron, kies fizionomio, de tiu fatala tago, estis firme stampita en sia memoro.

La du viroj interparolis kviete, dum Poliksena, sidante ĉe la flanko, iom malantaŭe de sia patro, rigardadis la teron, sed ŝi tute klare sentis sur sin la penetrantan rigardon de la fremda viro. Post kelka horo la severa, decidema memo de Aĥilo subite vekiĝis, do, senpretekste sciigis al sia vizitanto sian deziron, rekte petis de la maljuna reĝo la manon de lia ĉi-estanta filino. Li diris, ke li deziras igi ŝin sia edzino kaj aldonis, ke tio povos eble konduki al la fino de la milito. Priamo, neatendite trafita de tia miriga propono, restis longe senvoĉa, fine, montrante favoran teniĝon, li diris, ke li unue devas zorgi pri la enterigo de sia filo, kaj poste pensi serioze pri la afero, kaj pridiskuti ĝin kun siaj filoj kaj proksimuloj. Li promesis, ke ĝis difinita dato, li sendos al li sian oficiale definitivan jesan respondon. Priamo foriris dirinte nenion plu al sia filino, sed, post kelkaj tagoj, en la troja palaco flirtadis nepreciza famo pri iu geedziĝo.

Dume, la milito daŭris kaj post la morto de

Hektoro la Helenoj estis pli kaj pli atakemaj, do fortaj bataloj estis tre oftaj kaj preskaŭ ĉiam, inter la protagonistoj, estis Aĥilo.

Estas malnova proverbo kiu diras, ke kiam la homoj faras planojn, la dioj ridas!

Do, venis unu ankoraŭ fatala momento, en kiu, sago de Pariso (Πάρις) trafis je la ĝusta punkto la nevenkeblan de proksime grandan heroon. La enorma korpo de Aĥilo falis senviva kaj ankoraŭfoje ŝajnis, ke la mondo perdis sian ekvilibron. Nigra funebro falis sur la helenan flankon kaj senbrida ĝojo eksplodis en Trojo. Ĉio tio ĉi estas konata kaj nur tio, kio okazis en la koro de la malfeliĉa Poliksena estas nekonata.

Pasis tempo, la milito daŭris ankoraŭ kaj ankoraŭ, tamen iam ĝi finiĝis. Trojo falis, ĝi estis detruita, forbruligita, neniigita! Nur malmultaj homoj sukcesis forsavi sin kurinte sur la monton. La reĝa palaco estis konkerita, forrabita, bruligita, la viroj de la reĝa familio estis mortigitaj kaj la virinoj estis kaptitaj kaj disdonitaj, kiel servistinoj kaj konkubinoj, al la ĉefaj armeestroj.

Inter tiuj estis la plej nova kaj plej juna armeestro, la estro de la Mirmidonoj, Neoptolemo (Νεοπτόλεμος), la filo de Aĥilo, kiu post ties morto venis kaj prenis lian lokon. Kaj tiu Neoptolemo, same bona kaj temerara militisto, estis multe pli sovaĝa, pli violenta, pli senindulga ol lia patro. Do, kiam la armeestroj

kunvenis por decidi pri la disdonado de la sklavinoj, Neoptolemo postulis, ke oni donu ankaŭ al lia mortinta patro la sklavinojn kiun li rajtas ricevi. Tia postulo kaŭzis ĝenon al la pli multaj estroj, sed Neoptolemo estis nekonvinkebla. Ĉiuj Mirmidonoj sciis kiun sklavinojn rajtas ricevi Aĥilo, oni serĉis inter la kaptitinoj, oni trovis Poliksenan, oni kondukis ŝin al Neoptolemo, ĉe la tumulto de Aĥilo. Ŝi ne kontaŭstaris, ne kriis, ne ploris, nur, la lastan momenton, petis ke oni ne tuŝu ŝin; memvole ŝi kliniĝis super la tombo, por akcepti la mortigan baton de la ponardo. Ŝi falis kvazaŭ delikata, freŝa branĉeto kaj kelkaj diris, ke multaj viroj, krudaj kaj sentimaj militistoj, ne povis kaŝi siajn larmojn. Pli poste, ĉeestantoj en la ekzekuto diradis, ke ŝajnis, kvazaŭ ŝi volonte marŝas al la altaro!

Trista, tamen bela amhistorio, kiu, krom ĉio alia, pruvas ke la amo ekĝermas en ĉia grundo, ĝi elkreskigas ĉiam same belajn florojn, sendepende ĉu ĝia semo estis ĵetita sur grundon fekundan, aŭ sterilan!

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Nicolino Rossi (1939 –)



Mi prezentas hodiaŭ al vi elstaran artiston de vortoj, la italon Nicolino Rossi. Unue legu laŭte jenajn versojn el lia poemo Elegie:

*Ventoblov': branĉomov'
dancema
Ventozum': ora lum'
ekstrema
volvas jen valon en
orfluo,
por la vid' gaja rid'
kaj ĝuo.
El tra nub', el tra rub'*

*ĉiela
ridas nun brila sun'
kaj bela,
pentras ĝi per radi'
la valon.
Gaja hen': vokas jen
ĉevalon.*

La versoj priskribas idilian somertagon en la itala kamparo. Per klaraj sinsekvaj bildoj la poeto kreas tutecan efikon de vidado, moviĝo, aŭdado en sonoraj silaboj de ritmo kaj rimoj.

La lingvo mem atestas lian utiligon de la artismaj rimedoj de Esperanto: kunmetitajn substantivojn (ventoblov', branĉomov'), varieblecon de adjektiva pozicio (ora lum' ekstrema, brila sun' kaj bela), inverseblecon de la subjekto (ridas nun brila sun'), uzon de tuj-sinsekvaj prepozicioj (el tra nub', el tra rub'). Tiaj rimedoj kaj multaj pliaj estas aparte utilaj, kiam multaj signifoj estas esprimitaj per malmultaj vortoj kiel estas en la supra ekzemplo. Vorta artisto kiel Nicolino Rossi plene scias utiligi la eksterordinaran flekseblecon de Esperanto en kombino kun striktaj postuloj de ritmo kaj rimoj.

Nicolino Rossi naskiĝis en 1939 en la urbeto

Santarcangelo de Romagna en la provinco de Rimini, Emilia-Romagna en Italio. Li tamen estas sanmarina civitano kaj laboris en Napolo kiel hoteloficisto. Li lernis Esperanton en 1962. En intervjuo li menciis, ke la unuan kontakton kun la lingvo li havis danke al sia amiko, kiun li komence eĉ mokis pro lia entuziasmo; poste lin same kaptis entuziasmo pri la lingvo. Evoluo fakte ne malofta. Li diplomitiĝis pri Esperanto, kunlaboris kun la itala literatura rondo "La Patrolo" kaj aniĝis al la redakcia stabo de la revuo "Literatura foiro". Li instruis Esperanton en Napolo kaj gvidis televidkurson pri la lingvo. Li ricevis diversajn premiojn pro poezio en konkursoj, i.a. ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA por kiuj li dum kelkaj jaroj servis kiel unu el la juĝantoj.

Lia unua libroforma verko estis traduko de poemoj de la granda itala poeto Giuseppe Ungaretti – entute 17 elektitaj el la periodo 1937-1946, kiuj aperis sub la titolo La Doloro en 1975. Malfacila tasko, ĉar la poezia stilo de Ungaretti estas vorte kaj verse ege preciza kaj sence ofte obskura. Tiun taskon Nicolino Rossi plenumis konvinke por ĉiu serioza leganto. Kvin jarojn poste, en 1980, aperis lia originala poemaro Sur la vivopado, dividita en tri partojn, kiuj formas evoluon ciklon. Tamen antaŭe dum multaj jaroj Rossi estis bone konata kiel poeto de pure persona stilo kaj fakeca kompetento. En antaŭparola intervjuo li tamen ne bedaŭris la malfruan aperigon de la libro, ĉar sen la tria parto, kreita laste, la poemaro impresus kiel nekompleta verko. La unua parto, titolita "Ĝoje kaj sufero", enhavas poemojn verkitaĵojn en la periodo 1968-1971. Ili atestas fortan ligitecon al metrikaj kaj rimaj postuloj kaj al tradiciaj poemformoj, sed pli liberaj versformoj tamen ne estas neglektitaj. En la dua parto, "Gaje kaj sufero" (1971-1974) liberaj versformoj superas, tamen kun disaj rimoj ie kaj tie. La trian

parton, "Karme kaj sufero" (1974-1978) ankaŭ plejparte karakterizas liberaj versoj.

La poeto mencias en la citita intervjuo, ke lia kreskanta prefero de liberaj versformoj permesas pli intiman prozodion ol la metrike mezuraj formoj. Aparte notinda estas la vorto "sufero", kiu aperas en ĉiuj titoloj de la tri partoj. Tio rajtigas rigardi suferon kiel gvidfadon tra ĉiuj partoj. La poeto komentas, ke en "Ĝoje kaj sufero" multaj poemoj fontas el rimarkoj pri iuj faktoj de la vivo, tra kiuj trediĝas tiu gvidfadeno. Socia engaĝiĝo estas tie forta, sed en dua parto, "Gaje kaj sufero", esprimiĝas objektiva sufero dum persona sperto, la poeto esploras sian memon, kio formas ponton al la tria parto, "Karme kaj sufero", kie la poeto trovas klarigojn kaj motivojn de la sia sufero. La vorto "karme" indikas, ke tiajn motivojn li trovis en ideoj devenaj el hinduismo kaj jogo. Entute, la poemaro Sur la vivopado estas intima homa dokumento, pli persone profunda ol aliaj poemaroj Esperantaj, kiujn mi konas. Ĝi plene meritis en 1981 la premion La verko de la jaro.


Nicolino Rossi meritas lokon kiel unu el la plej subtilaj kaj artismaj poetoj de la nuntempa Esperanto-literaturo. Li estis ankaŭ bone konata kiel elstara recenzisto kaj eseisto kaj diligenta tradukanto. En 2008 aperis lia gvidlibro pri Napolo, Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj. Li ankaŭ tradukis multajn napolajn kanzonojn kaj la verkon (de Vittorio Russo) Danteskaj Itineroj (2001). Ankaŭ kiel instruisto de Esperanto li havas bonan reputacion kaj en 2000 aperis liaj lernolibroj por italaj gestudentoj Esperanto rapide.

(Juna amiko, aprilo 2011)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/rossetti.html>

La Kimero - Rakonto el la estonteco (16)

-- rakonto de Erik Tantal



Nova komenco

Estis nur afero de tempo. D-ro Mojo ne plu vidis eblon daŭrigi sian esploradon en ĉi tiu instituto. Kune kun kelkaj dungitoj de la instituto, inter ili d-ro Zan kaj Tim, la iama bestogardisto, li decidis fondi propran instituton eksterlande, kompreneble en la insula ŝtato Salapaku. Tie la kondiĉoj estis idealaj, ne nur rilate al la klimato, sed precipe por libera esplorado.

Malgraŭ la granda distanco Mojo tenis bonan kontakton al prof-ro Brundt. La fama medicina konzerno 'Sanglobo' finance subtenis la planatan projekton. Tial eĉ realiĝis la deziro de Mojo kunpreni



ĉiujn ĉimpanzojn de la iama sekcio. D-ro Mojo daŭre laboradis ĝis granda aĝo por la scienco kaj ricevis mondiskalan laŭdon. Li mortis sesdek ses-jaraĝa, tre alta aĝo por ĉimpanzoj.

La infanoj de Mojo

Cent jarojn poste.

Malapaki, la ĉefurbo de la insula ŝtato Salapaku, estis nerebonebla.

Ĉie oni konstruis ion. En la apudeco de la flughaveno multaj novaj hoteloj blokis la vidon al la bela plaĝo. Ĉi tie amasiĝis la plej multaj turistoj. Sed ankaŭ la IPG, la granda Instituto Por Gentekniko ankaŭ registris ĉiujare rekordan nombron da vizitantoj. La instituto estis formita de d-ro Mojo laŭ modelo de la malnova IBE.

En la enirhalo prezentiĝis la imponaj baraĵoj por la bestoj malantaŭ gigantaj vitraĵoj. La koridoroj de la plej multaj sekcioj estis libere alireblaj por la vizitantoj. Ankaŭ ĉi tie oni povis admiri multon. Eĉ sekcio por primatoj allogis la vizitantojn. Kaj, tio estis vere nova, la aparta baraĵo por homoj, kiuj tie loĝis ŝajne tute 'normale' malantaŭ la vitraĵoj. Ĉiu povis observi ilin. Kompreneble, kiel en la areo por ĉimpanzoj, la enloĝantoj ĉiam havis la ŝancon retiriĝi en la malantaŭajn nevideblajn ĉambrojn.

Kia kontrasto! Jen la homoj en ĉirkaŭaĵo tute teknikigita. Ĉie, kie la homoj loĝis, troviĝis aparatoj kaj konstruitaj objektoj. Nur kelkaj endomaj plantoj ornamis la ĉambrojn. Kontraste la ĉimpanzoj en tute natura medio. Oni eĉ rifuzis 'homajn' ludilojn kiel ekz. pilkojn.

Kaj ekstere, en la koridoro antaŭ la ekspoziciaĵoj, gapis la vizitantoj: homoj apud ĉimpanzoj. Sed ĉu vere la nomo por tiuj homsimioj ankoraŭ ĝustis? Ili parolis kiel homoj. Ili eĉ interparolis kun ili. Ili estis la posteuloj de la 'Infanoj de Mojo', do, la ĉimpanzoj, kiuj estis naskitaj antaŭ pli ol cent jaroj per artefarita fekundigo de genteknike modifitaj ĉimpanzaj ovoĉeloj.

Pli precize dirite, kompreneble, ne ĉiuj estis liaj propraj posteuloj. Por naskigi infanojn d-ro Mojo zorgeme priatentis la genetikan diversecon. Tial li elektis multajn diversajn ovoĉelojn. Nur la genetikaj sekvencoj, kiuj respondecis pri la novaj trajtoj, venis el lia propra korpo, kiu ankaŭ gastigis homajn ĉelojn. Li estis ja kimerio. Do, tiuj genetikaj informoj de la homo finfine gravis por la novaj kapabloj de la ĉimpanzoj. La parolantaj ĉimpanzoj nun ricevis la nomon 'Panhomioj'. De ekstere ili aspektis kiel ĉimpanzoj, nedistingeblaj de la normalaj samspecianoj.

Intertempe ĉirkaŭ ducent panhomioj vivis nun en

Salapaku, kune kun la homoj en rilato, kiun oni povas nomi simbiozo. La panhomioj ŝatis uzi la homfaritajn domojn, ĉar ili ne estis bonaj metiistoj. Kontraŭe pro superaveraĝa inteligenteco ili ofte okupis bone pagatajn postenojn en sciencaj kaj edukadaj institucioj. Ekzemple, estas preskaŭ memkompreneble, ke la ĉefo de la IPG estis panhomio. Sed ankaŭ troviĝis ne tiom inteligentaj samspecianoj. Tamen, sur unu kampo ili estas ĉiam nevenkeblaj. Same kiel ilia prapatro d-ro Mojo ili ĉiuj povis tre bone ludi tenison.

Eĉ ekzistis speco da sporto, kiu ĝis nun nur troviĝis sur Salapaku: 'Kampoteniso'. En tiu sporto du teamoj el po kvar ludantoj interbatalas. Ĉiu ludanto nur rajtas movi la pilkon per sia rakedo. La celo estas katapulti la pilkon super la reton, kiu dividas la ludkampon. En la ĉefurbo konkuradas ses teniskluboj. Ĝis nun la ĉampiona teamo kompreneble ĉiam estis de la klubo de la panhomioj.

Dum la jaroj la IPG iĝis la tutmonde gvida centro por gentekniko. Ne nur la konzerno Sanglobo profitis de tio. IPG kaj Sanglobo estis la plej gravaj dungantoj por la insulo. Mendoj por esploraj laboroj venis el la tuta mondo. La ĉefaj taskoj rilatis al la testado de novaj medikamentoj per specialaj kulturoj de genteknike modifitaj ĉeloj.

Ankaŭ la kultivado de organoj, taŭgaj por transplantado, daŭre okupis la esploristojn. La problemo ankoraŭ ne estis solvita, sed la IPG trovis multesperigan metodon. La esploristoj ĵus sukcese kultivis kompletan kuniklan hepaton en la laboratorio. Tiun artefaritan organon oni uzis por transplantado. Ĝi anstataŭigis hepaton en kuniklo, kiu ne repuŝis tiun greftaĵon. La transplantado nun bone provizis la kuniklan pacieron dum jam du jaroj.

FINO

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Unuopuloj kaj fremduloj

La Unusola

Unu sola emocia amornokto povas senbridigi nin por ĉiam; kiu iam amis la ĝustan, volas ami ĉiujn. Li tuŝis la senforman kaj anoniman fundon de amoro, kaj jam sekvmatene, elpaŝante sur la straton, li devas artifice devigi sin por ne foriri kun la unua-vida ajnolino, ĉar nun ili ĉiuj venas renkonte al li, kun rideto kaj rigardoj kvazaŭ ili estus rekte altirataj de lia gaja etoso aŭ de la lumo de volupto radianta el li. Tiel ni nutras - ni viroj kun la malbona memoro pri belulino, ni malfeliĉuloj, ne: ni feliĉvunditoj, ĉar almenaŭ unu fojon ĝi profunde trafis nin -, tiel do ni nutras nian tutan teran tempon per amkomencoj, per tiuj triumfaj kaj senbridaj komencoj, tra kiuj eloviĝas ĉia historio kaj socia historio kaj kiuj donacas al ni sensanĝan nuptadon. Sed kio sekvas el tiuj komencaĵoj, tio estas nepre la historio, senekstaza kaj kruda, kaj ĝi diserigas nin en la plej dolorajn diferencojn. En kiom da seniluziigitaj vizaĝoj mi jam rigardis, kaj kiom tio doloris! Ofte nun, en tiu tenaca frumateneco, ili aperas en la ĝardennebulo, la muta rondo de miaj amarulinoj, kiuj ĉiuj iam kreis kun mi la komencon - kaj ĉiu estis iam la sola ĝusta! Mute ili trairas la grizan aeron, kaj vere, ili estas teruraj miksestaĵoj, absurdaj fabelbestoj, ĥimeroj de sensplezuro kaj de melankolio, alvokitaj de la frenezaĵoj de adoro, de simila vizaĝo, de retrovita donaco - ho tiu muta, malsata bando! Sed neniu plu alparolebla; senemocie kaj kun fiera miro ili spektas miajn malesperajn provojn elpetegi ilian pardonon. Ho miaj amikinoj, haltu! Atendu ankoraŭ unu vorton!... Aĥ, ili estas nur la malplenaj ombroj de la mizera, malbenita komenceco; kreitaĵoj senanimigitaj de mia entuziasmo. Kiajn kruelajn mallongigojn mi faris al homoj! Nenio mi estis ol ĉiama, mizera komencfaranto, senrespekta kaj nebonigebla, ĉarmegita kaj nekapabla ami la intimulinon, prefere preta tuj interŝanĝi ŝin kun la venonta bela nekonatulino. Malsana, sovaĝa, freneze altirata de tiu, kiun mi nur vidas kaj ne devas ekkoni; soifa je blindiĝo kaj iluzio; kreanta vivon el trompo, el maltrompo ĉerpanta novan vivon ... Sed: por kio la ĉiam nova pasio, la nekomprenebla entuziasmo? Finfine ĝi restas do malbono, malsano de la animo, manko da saĝeco. Kaj mi, nun jam kun certa kvanto da

jaroj, iom ĉifita entuziasmulo, kiu ĉiufoje pli rapide perdas la emon kaj post ĉiu perdita emo fariĝas eĉ pli maltolerema, ĉu mi devas do pliajn dudek kvin jarojn erarvagadi tra tiu fialloga mirĝardeno plena de mire belaj fantomoj, neelĉerpeblaj proksimiĝoj kaj eterne senelsava agado? Post ĉiu fenestro surprizita fremdulino, post ĉiu paŝo larĝanima submetiĝo, post ĉiu acerba voĉo la kriego de kuniĝo! Kaj ĉiu malplena mano alrigardas min kun granda, mola okulo. Ĉar okuloj estas en ĉio, en manoj, haroj kaj kokso, la okuloj de genuo kaj mammo, de kolo kaj ŝuo, ĉiuj ĉi ĵetas siajn lumturajn rigardojn ...



La sola obskura punkto de la tuta homsekseco estas kaj restas la malfermita vizaĝo. La pli profunda aperaĵo, la aspektoj de vizaĝo, daŭre postulis de mi obeeman honorigon, ili interrompis mian avidon kaj malakrigis ĝin ĝis pura malemo. La vizaĝo - almenaŭ kiam ĝi estas malfermita, rigardanta - fleksas la blindan impulson, ĝi restas lasta, neprenebla distrikto de ĉasto, de malluma ekkono, de kredema timo. Kaj estas ja sufiĉe konfuzige, ke ni ekstere, en la civilizita regiono de la strato estas allogataj ĝuste de la plej natura logo, la plejakcentita dorso, por nur poste, interne, malantaŭ la kurtenoj ekvidi la kontraŭon de la allogo, la averton: la vizaĝon. Ĉu entute ni rajtas paroli pri vera kuniĝo, dum niaj voluptoj okazas antaŭ la sojlo de la ĉasto, dum la vizaĝo estas sentata kiel gardisto de la dorso, la honorigo kiel cenzuro al la volupto?

Ĉar kiom ofte mi vidis helan kaj vekitan vizaĝon, parolantan, kaj ĝi vekis mian tutan sinceran deziron - kaj post mallonga tempo restigis ĝin tute ĉagrenita. Ĉar apud ĝi la okuloj de la ventro rigardis senĉarme kaj blinde. Aŭ inverse mi estis fordonita al bela korpo, al alta figuro kaj rigardis ĉe tio en karnecan vizaĝon, kiun mi eĉ ne volis kisi, tiom malpura, tiom malklara kaj abomena ĝi ŝajnis al mi. Inter tiuj kontraŭaj efikoj mia volupto erarvagadas alen kaj reen kaj verŝajne por ĉiam rifuzos al mi la elsavan kompenson. Kaj ĉiam malhelpos min aparteni longtempe al alia homo. Ĉar eĉ kun mia tuta devoteco antaŭ la homa vizaĝo - kiom da ili, kiuj iam proksimiĝis al mi, mi jam delonge forgesis! Kiom rapide forgesis! Venas ja ĉiam novaj. Kaj multaj akiras sian veran lumforton nur preterpasante. Kiam ili aperas en la amaso kaj malaperas, ili ofte jam elspezis sian ĝojigan mesaĝon. Ĉiam denove venas novaj. Neniam mi serĉos, kiel la vera amanto, tra la multaj la unusolan. Ĉiu unusola memorigas min nur pri la multaj.

Karmela senvestigas sin

Karmela senvestigas sin. Kun krucigitaj levitaj brakoj ŝi ŝovas la puloveron super la kapon, malsupren ŝovas la malbukitan ĵinson, plukas la kotonajn ŝtrumpetojn de la piedfingroj. Tiuj prenoj kaj tordiĝoj havas ion nepre ĉastan. Ili devenas ankoraŭ de la tempo, kiam la knabineto sole en sia ĉambro demetis la tagajn vestaĵojn. Kaj ili ne ŝanĝiĝis. Ili estas hodiaŭ la samaj kiel tiam. Dum oni do kuŝas surlite kaj frostremete atendas la tuŝigon kun nuda korpo, tiu jam per praa kutimo, per etoso de fruaj infantagoj, ĉaste envolvis sin.

Preskaŭ neimageblas, ke virino ankoraŭ kun solena senhonteco demetas siajn vestaĵojn antaŭ sia amato. Kaj same: ke viro ne kaŝe ridetas pri tio kaj ne trovas strange, ke la virino senvestigas sin antaŭ li 'publike'. Ĝenerale la senvestiĝo okazas nun nek lascive nek honteme, sed tiel, kvazaŭ neniu ĉeestus. Kaj kia vestaĵo estas estas tiu, kiu tie falas! Pulovero, eble ankoraŭ korsajeto, paro da ŝtrumpetoj, bunta kalsoneto, mallarĝaj ĵinsoj. Post kiam unu tubo feliĉe

pasis tra la kruro, la amatino saltetas sur la nuda gambo, dum ĉe la alia piedo alkroĉiĝas la pantalono kaj estas flanken deskuata. Aspektas tiel. Ne kiel la danco de la sep vualoj.

Ĉia ŝtofo estas erota metamorfozo. La volupto mem estas la ŝtofo, efemera kaj saltrapida.

Pro tio ankaŭ la sonĝo estas tia ĉarma terpeco, en tiu senco ke nur tie ĉia deziro ricevas la konvenan efemerecon. Aperajo - tuŝigo - plenumo - superflueco. Alta, preskaŭ sentempigita intenso. La sonĝo forigas la objekton¹. Ĝi estas pura aneksado², solvo.

La historioj pri transformiĝo estu lavado, celanta la puran seksecon.

¹ Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss2.html>

Akvofalo kaj Rivereto

fabloj de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio



*Bruanta Akvofal' defalis kun sever'
Kaj al kuraca font' ĝi diris en fier'
(Sub monto en angul' nerimarkeble tute
Murmuris en modest' malgranda tiu font'):
"Je akvo estas vi malriĉa absolute,
Vizitas tamen vin la tuta mond!
Impresas mia fort' per la potenc-minaco,
Per kio logas vi?" — "Tre simple, per kuraco,"
Audiĝis en modest' respond'.*

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979) Ukrainio

Henry de Montherlant

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Henry de
Montherlant
(1895-1972)

estis franca verkisto, kiu post verkinte en la periodo inter-du-militoj polemikajn romanojn pri ŝato al taŭroludo, sporto, virecaj virtoj, malestimo je la virinoj, en la 40aj-60aj jaroj verkis serion da seriozaj teatraĵoj, el historiaj temoj, kiuj restas ĉiuj



kiel ĉefverkoj de profunadaj temoj, historia skrupulo, psiĥologio, veraj tipoj de l'klasika gusto. Kaj kiel en ĉiuj « klasikaj » teatraĵoj, le por, la malpor kaj ĉiaj aliaj tezoj kaj antitezoj estas sambone traktitaj kaj miksitaj.

En unu el ili «Port-Royal» li traktas eventeton el la religia historio de l'franca 17-a jarcento, pri la disputoj okazintaj ĉirkaŭ la jansenisma movado

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Jansenismo>

En tiu perfekte «klasikstila» teatraĵo, li homo de l'20-a jarcento sukcesas paroli per la lingvaĵon de la 17-a jarcento, li ateisto paroligi kristaninojn kaj plananime bildigi iliajn sentojn, kaj dum faranta



kreadon de verkisto, resti skrupule fidela al la historiaj eventoj, ĝis en ties detaloj. Tiu historio pri religiaj disputoj 17-jarcentaj povus esti tute ekstempigintaj (sed ĉu vere estas malvirto? ĉu ne estas male plezuriga, kaj riĉiga, por ioma tempo eskapi al sia propra kadro kaj agordo kaj enigi sin en alian? alilandan, aliepokan?). Sed fakte tiuj kunpuŝiĝoj kaj disŝiriĝoj foje montriĝas impresive « aktualaj » temoj ! Demonigo de alipensantoj, blinda obeemo, ktp, juĝu mem. Jen eltiraĵo de la teatraĵo :

Iom en komenco de l'teatraĵo, la scenejo estas en la parlejo de l'abatejo de Port-Royal; de malantaŭ la krado fratino Gabrielo parolas kun visitanto :

LA VIZITANTO :

Senrespektulino ! Ĉu al via patro vi parolas tiel ? Kaj ĉu via patro estas por vi « La mondo » ? Ha ! mi konjektas, ke malantaŭ via vualo vi certe akiris tiun pinĉitan buŝon kaj akrajn okulojn, kiun oni ekvidas post iom da tempo, kiam per hazardo ili malvualiĝas, ĉe tiuj, kiuj eniris tie ĉi. Nu do ! Jen mi do klarigos min. Vi, kiu donis vin al Dio de sufero, tio estas iel via sorto vivi en affliktado. Sed ni, kiuj ne forlasis la centjarojn (1), vi ne scias kiun kondiĉon estas farata al ni, kaŭze de vi, kaj la sinjoroj, kiuj kondukas vin. Ĉio fartis bone, ĉio plenumiĝis fide kaj glate. Kaj tuj abrupte, la rideto mallumiĝas, la paroltono frostiĝas ; la pordo fermiĝas, la afero maltrafiĝas, la proceso estas malgajnita, la financiĝo malligita. Kio estas la tubero en la afero ? Kio okazis ? okazis, ke iu ligis al via nomo tiun vorton : jansenisto. Kaj cetere ne estas bone sciata en kio konsistas esti tio. Sed sufiĉas : la vorto diritas, kaj jen vi inter la favuloj ; rajtantaj apenaŭ nur la etan lokon, kaj l'ostojn kiujn oni ĵetas sub la tablon; flanken, rubujen, klinanta l'dorson, tanĝanta l'murojn, kiel venkito en sia de l'malamik' okupata lando ...

FRATINO GABRIELO :

Koncerne pri ni, la fraŭlinoj de Port-Royal (2), povas esti dirata, ke reĝa mezuro estas al ni donata : ni estas samtempe miskomprenataj, furoraj, kaj abomenataj

LA VIZITANTO :

Subskribu, filino mia, subskribu tiun Formularon, kiu metos nin ĉiujn en pacon. Obeu vian Ĉefepiskopon. Kiom bone oni spiras, kiam oni faras nenion alian ol obei ! Kiom vivo subite fariĝas facila ! KREDU pri tio maljunan soldaton. Nu jen! ĉu vi promesas ĝin al mi?

pli poste, en mezo de l'teatraĵo:



LA ĈEFEPISKOPO :

Aŭskultu min bone ; Estas la Papo, aŭ pli bone du Papoj, ĉar du papoj elparolis ; poste estas la Reĝ', poste l'Episkopoj, poste la Fakultatoj, la Doktoroj, la religiaj komunumoj ; kaj ĉiuj kune samopinias, krom manpleno da fraŭlinoj, el kiuj kelkaj, kiaj vi mem, estas knabinoj, kaj kiuj volas dikti leĝon al la kleruloj kaj aŭtoritatoj. Konsistigas tio ribelon, kiu estas netolerebla. Ĉiaterene kien ja irus ni, se ĉiu ekpensus per si mem ? Estas kredendaro, estas kanono, estas la superuloj kaj la malsuperuloj. Kaj kial do Dio metus homojn super niaj kapoj, se ne estus por tio, ke ni obeu ilin ? Ni vivadas, dank'al Dio, en reĝlando kie la subulo ĉiam restas sur la propra loko. Ĝis tien, kien estas en miaj kapabloj, ne estos dirata, ke tiu natura ordo estas falpuŝita. Neniame mi konsentos. - Kaj nu pensu, ke tiom malmulton estis petita al vi ! Estis al vi petita esti kiel la aliaj, ĉu aŭdas vi ? tutsimple kiel la aliaj !

FRATINO FRANSCISKO :

Ni estas malsamaj kaj, pravas, estas tio ununura la kulpigo, kiun oni havas kontraŭ ni. Ni estas malsamaj, sed kristanismo estas malsama, ĉefepiskopa Moŝto. Je mia parolvico mi diros al vi, ĉefepiskopa Moŝto : aŭskultu al mi, aŭskultu tion. En unu vilaĝo estis ekleziulo kiu daŭre legadis sian brevieron. Tiam en la vilaĝo ili komencis nomi lin jansenisto. En unu monaĥejo, estis pensioninetoj, kiuj ĉiam kun mallevitaj okuloj iradis : tiam oni finomis ilin jansenistinoj. En ĉiaj lokoj kie kristanismo estas rigardita kun seriozo iom pli ol en la aliaj, oni nomas jansenistojn tiujn, kiuj tiel ĝin rigardas, kaj oni pritraktas ilin kiel malbenitulojn kaj pestulojn. Estas tiu amo, kiun ni direktas al Dio, kiu havigas al ni la malamon de l'mondo. La mondo malamas nin tiel, kiel ĝi malamamis Jesuon Kriston.

LA ĈEFEPISKOPO :

Nu jes ja, vi estas sanktulinoj ! – Sanktecon ! Sanktecon ! Vi, vivas vi, kun terenmallevitaj, aŭ kun ĉielenlevitaj okuloj. Estas mi devigita rigardadi je l'nivelo de homalto. Devas mi movigi la homojn. Mi devas uzi ilin. Mi devas laŭiri laŭ ili. Kaj ĉio-ĉi kiel eble plej kristanece. La arton vivi kun sia kunhomo oni ne ellernas en la nuboj, nek en la preĝado.

(1) = la mondo, la reala ekstera vivo, la nereligia socio.

(2) la nomo signifas: Reĝa Haveno

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

16/03/2009

Albana mor-kodo

Milithistorio

(Fragmento el la libro "Mi vivas por rakonti: de Frato Zef Pillumi 1)

La filoj de Zef Delia nun estas nur du. Ilia patrino estas nobla maljunulino el Shala 2, kiu apenaŭ havas similulon surtere. Dum la Dua Mondmilito, komence de aprilo 1941, la jugoslava armeo eniris Dukagjino-n 3 ĉe Kolo de Peja kaj elokupis teritorion ĝis la Kara Ponto de Postriba, survoje al Shkoder 4. Dum oni estis preparanta la atakon kontraŭ la urbon, alvenis la novaĵo ke Belgrado jam falis en la manojn de germanoj, tiel la plejparto de tiu jugoslava armeo kapitulaciis al la italaj 5.

Sed alia parto ilia pensis pri regula retiro direkte al sia patrio, revenante denove tra la subigita Dukagjino. La dukagjinanoj, antaŭvidante, ke la frakasita armeo povus konduki pli malbone ol tiu venkinta, organizis embusojn ĉe la Ruĝa Ŝtonego, super Prekal 6. Kiam la avangarda taĉmento alvenis en la Ruĝan Ŝtonegon, ekpafis la fusiloj. Jugoslavo jam vidis sin sieĝitaj, tial ili klopodis malfermi al si la vojon.

La embusoj estis ĉiufanke: jen sur la deklivo transe, jen laŭvoje. Tiu, gvidinta al la avangardo jugoslava, estis ja bravulo kiel Zano 7 kaj per ĉiu unuopa pafo mortigis po unu homon. Sole li mortigis ĉiujn embuskulojn laŭlonge de la Ruĝa Ŝtonego. De la kontraŭa deklivo li ricevis du-tri vundojn: ĉiujn sur la gamboj. Sed li ne haltigis la marŝadon, daŭrigante supren. Eniris la arbaron. Transpasis la montan kolon, poste tra la nuksujo kaj malsupreniris ĝis la unua vilaĝo haltante ĉe la unua ties domo.

Li havis vundojn kaj pro sangoverŝo estis ege "debola" (malfortika). Li ne povus plumarŝi. Vokis deekstere per sia lingvo. Deinterne oni respondis:

- Venu! Bonvenu!

Estis la tagopinto. Sofio Lekja eliris ĉe la pordon kaj ekvidis la fremdan junulon vestita per serba militsurtuto kaj kun fusilo surŝultre.

- Envenu: Gloron al nia Dio!

La junulo eksidis sur benketon, malstreĉigis unu gambon kaj komencis involvi la pantalonon. La vundaĵon li estis liginta per tolaĵo ricevinta la

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

sangokoloron.

- Vundita?- ekkriis la oldulino.

Tuj poste ŝi rapide malfermis maton kontraŭ la kameno. La junulo tuj ekkuŝis. La albanino elmetis el la kestego botelon da altkvalita rakio 8, malligis la sangumitan tolaĵon kaj enverŝis rakion sur la vundaĵon; estis ja du tiaj, unu malpligranda kaj alia granda sur la gamba polpo; surmetis ankaŭ du tabakajn foliojn. Poste elprenis el la kestego viran pufan pantalonon per kiu ŝi involvis la vunditan gambon daŭre sangverŝante. Rapide helpis al li demeti la militan surtuton kiun surmetis sub la kapon kiel kusenon; la randofino de la surtuto havis kelkajn kartoĉajn truetojn. Ŝi alportis alian botelon da rakio kaj pecon da pano kun fromaĝo, mansignante al la kuŝanta fremda junulo por ke li ekmanĝu. Ĉi lasta, ege malsata, postkiam sorbis du-tri foje rakion, ekmanĝis. Dume ŝi eliris eksteren por serĉi sur la montaj ripoj la sangan herbaĵon 9. Revenis kun malgranda bukedo enmane kaj komencis premi ĝin en la glason. Tuj manĝinte la junulo, ŝi proksimiĝis, malligis la gambon denove kaj surmetis sur la vundaĵojn la sangan herbaĵon, poste kelkajn tabakajn foliojn kaj religis ĝin.

Kiam la junulo ekkuŝis, Sofia kovris lin, dume li ekdormis. Ŝi eliris al la pordo. Kvankam sufiĉe malproksime de la Ruĝa Ŝtonego, tie, malsupre, la montoj eĥadis pro la milito inter albanoj kaj jugoslavo. Ŝi rigardis la montajn deklivojn. La vilaĝo estis dezertigita, nur kelkiu oldulino povus trovi ĝi tie. La novelzinoj kun du malgrandaj nepoj ŝiaj estis rifuĝintaj en la grotoj kaj en la arbarinterno. Nur la pastoro plurestis ĉe la preĝejo. Ŝia pliaĝa filo estis kuniĝinta kun la aliuloj por militi. La soligita patrino atendis novaĵojn. Ŝi ne povis foriĝi sufiĉe multe de la domo ĉar en ĝi jam estis rifuĝinta vundita soldato. Kiam ŝi estis enirante tra la pordo de la domo ŝi eksentis kriojn:

- O Deli Deda! Atendu nin tie!

Ŝi rekonis la voĉon: ĝi estis la voĉo de la kvazaŭfrato de ŝia pliaĝa filo. Ŝi atendis lin ĉe la pordo de la hejmo.

- Hola, Ded Mehilli, kial vi foriris kaj forgesis la hejmon? Kion vi rakontos al mi, la patrino?

Ded Mehilli estis alveninta kun aliulo, ambaŭ



portis surŝultre fusilojn kaj ĵus estis revenintaj el la batalejo. Li estis ne nur samaĝa al ŝia filo, sed estis ankaŭ bonega amiko lia, ĉar ambaŭ estis trinkinta reciproke la alies sangon, do estis fariĝintaj "probatinoj" aŭ kvazaŭfratoj. Pro tio, la kamaradoj de ŝia filo estis elektintaj lin kiel oportunan heroldulon por sciigi al la patrino la mortonovaĵon. Kaj li ne kuraĝis fari tion ankoraŭ. Li estis pripensante, sed senrezulte.

Enirinte en la hejmon, ambaŭ kamaradoj eksidis sur la benketojn. Ŝi regalis ilin per glaseto da rakio. Dum ili estis trinkonta, ili ekvidis antaŭ si kuŝantan homon ĉe la kamena rando:

- Kiu estas tiu kuŝanta?

- Ankaŭ mi ne scias; estas ja vundita jugoslava soldato.

- Montenegrano? Serbo?!..

- Estas homo, junulo! Ĉiuj homoj estas ja egalaj, ĉu montenegrano, ĉu montarano, tutegale!

- Ĉu ni vidu mem lin?

- Ne malkovru lin ĉar nur antaŭ nelonge li ekkuŝis por ripozi.

Sed ili malkovris iomete la ties vizaĝon:

- Uuuu! Vidu kiu estas ja! La Diablo mem! Ni mortigu lin ĉimomente ĉi tie ĉe la kamena rando!

- Kion vi parolas? Ĉu vi ne scias, ke li estas mia gasto jam?

- Kies gasto povas esti la Diablo mem? Tiu estas ja la plej granda nia malamiko: ĝuste lin ni estas serĉante ĉar ĝuste li estas mortiginta vian filon!

- Mia filo havis tiun sorton en la milito, kaj se li estas mortigita de tiu ĉi homo, neniŭ kuraĝas ektaŭsi lin ĉar li estas jam en la manoj de la filoj de Deli Deda.

- Sofi, rezonumu, ĉar baldaŭ oni alportos vian filon sur brankardo!

- Ne gravas do! Estas jam sciite, ke la milito nur junulajn tombojn malfermas kaj patrinajn korojn buĉas, sed neniel oni povas toleri la honton enhejme.

Dume, la dormanta junulo vekigis kaj malkovris la vizaĝon, ekvidis la du junulojn kun fusilojn surŝultre, tro indignitaj kaj ekcetitaj, ŝajnis, ke li ektimis iomete, sed Sofio proksimiĝis kaj aldiris lin:

- Ĉu vi bezonas trinki akvon: restu ĉi tie kaj ne moviĝu, patrino!

Tiam ambaŭ junuloj ekstaris kaj eliris eksteren dirante:

- Aŭskultu Sofi Lekja, ni estas venkinta la ŝkjau-n¹⁰ hodiaŭ, kaj devigis ĉiujn kapitulacii en Shkoder, krom ĉi tiu. Ni estas mortigintaj multe da tiaj, sed ankaŭ el ni mortiĝis kvin personoj, interalie via filo kaj du aliaj samvilaĝaj, ĉar ĉiuj estis embuskintaj sur la unuaj vicoj. Nun ni estas elirante antaŭ la brankardo-portantoj, kaj alvenis ĉi tien nur por antaŭanonci vin kaj peti, ke vi elteniĝu kiel bravulinon.

La ege tristita patrino prenis alian maton kaj surmetis ĝin ĉe la alia flanko de la kameno por lasu lokon al ŝia filo mallongviva. Elmetis el la kestego la nigran kaptukon, kiun oni uzas okaze de mortosolenajoj kaj eliris eksteren por ke ekvidu la virojn revenantaj de la batalejo kun brankardoj surŝultre. Du el ili devojiĝis ĉe la Palaj kvartalo.

Kiam ili eniris en la malvastan padon kondukanta al ŝia hejmo, ŝi antaŭeliris kaj aldiris:

- Aŭskultu min, vi filoj de Shosh, aŭskultu mian parolon: Tie, interne, estas kuŝanta vundita soldato, kiun mi ne konas kaj nek scias, sed mi demandas de vi, ke neniŭ minacu lin, nek parolu malbonan vorton, ĉar mi ne kapablas toleri ambaŭ morton kaj honton.

Poste ŝi gvidis ilin al la hejmo por ke ili ekkuŝigu sian filon ĉe la alia flanko de la kameno.

- Nur unu kozon la patrino volas scii: kiuloke estas la vundo de mia filo?

- Ĝuste en la koro, - diris ili.

Ŝi malkovris la bruston plenigita per sango, fermis denove la surtuton, kisis la filon surfrunte kaj surokule, poste ekstarigis kaj ekviŝis la larmigitajn okulojn per randeto de la nigra kaptuko kaj diris;

- Eksidu, viroj, kaj trinku glaseton da rakio. Ĉu probable kelkiu el vi konas la lingvaĵon naŝke¹¹ kaj povas paroli kun tiu ĉi gasto enirinta nian hejmon?

Dum la viroj ektrinkis rakion kuraĝante la patrinon, sin prononcis maljuna viro, kiu iam estis rifuĝinta en Montenegro kaj tie eklernis naŝke-n. Sofia parolis:

- Aŭskultu, vi fremda junulo: Ne suspektu, nek timu ĝis vi loĝos en ĉi tiu domo, ĉar nenio malbona okazos al vi. Patrino klopodos por vi samkiel por siaj hejmuloj kaj ne zorgu nek enuu pro nia malriĉeco, ĝis vi resaniĝos. Kiam vi bone resaniĝos, ni kondukos vin ĝis la via lando. De kie vi estas?

- De Kolaŝino, de Montenegro.

- Ĉu via patrino vivas?


- Jes, ŝi estas samaĝa kiel vi, mi havas ankaŭ la patron kaj du fratinojn, mi estas edziĝita kaj nun atendas infanon. Ekde dek tagoj ni alvenis ĉi tien por militi, nur Dio scias, kio okazas en mia hejmo. Sed aŭskultu, vi nobla virino: kiom mi komprenas, tiu ĉi mortigita junulo estas via filo. Li povas esti mortigita ankaŭ de mia fusilo, kiu se ne mortigis lin estas mortiginta kelkajn aliajn kaj estas buĉinta multajn patrinajn korojn. Mi ja ne ekspektis tiom da nobleco de vi! De vi mi ekspektis nur morton, ĉar por tio ni alvenis ĉi tien. Multan dankon al vi pro noblaj vortoj, kiujn vi eldiris antaŭ ĉi tiuj viroj kaj kiujn mi kredas. Tamen, kiel eblas, ke mi manĝu panon per la manoj de tiu, kies filon mi jam mortigis? Ne nur hodiaŭ, sed ĉiutage mia vizaĝo plurestos mortigante vian koron! Pensu, ke ankaŭ mi sentemas kiel homon.

- Aŭskultu, filo de Kolašin: mia filo kaj vi neniam vidis unu la alian, nek konis unu la alian; neniam vi kvereliĝis, malamikiĝis kaj havis ian problemon inter vi; via fusilo ne estas la via, sed alies. Neniam mi volas, ke sekiĝu la koro de via patrino samkiel la mia!

Antaŭ ol mallumiĝu la tuta loĝantaro foririnta en la grotojn kaj arbarinternojn revenis kun la brutaro en siajn hejmojn, ĉar oni anoncis, ke ŝkjau kapitulaciis. Oni dissendis ankaŭ la nigran mortoscion: tri personoj en tiu kvartalo de Palaj kaj Ndreĝjinaj, du en Dardhe kaj Ĉilkok. Alvenis la virinoj vestitaj nigre por viziti kaj plori, la viroj por kondolenci kaj kuraĝigi kaj por entrepreni taskojn rilate la entombigon. La filon de Sofi oni eligis eksteren por lavi kaj vesti per novaj vestaĵoj. Nur tiam la patrino embarasiĝis, ĉar la tolaĵojn de sia filo ŝi ja estis uzinta por la vundita soldato. Sed oni petis novajn alihejme. Post kiam oni surmetis la tirqo-n kaj ruĝan xhamadan-on, la filon revenigis hejmen sur la bela kuŝejo. Pjeter, kiu scipovis naŝke-n estis hejmmamiko de Sofi, tial li plurestis hejme. Ĝis malfrue nokte, la homoj venadis kaj iradis, preparante la solenaĵojn de la entombigo, kelkiu tro laca ekdormis. Ankaŭ Pjeter Bala estis okupinte gastoĉambran anguleton, dum la mortinto restis sole sen gardanto dum certe da tempo. Dume, la ŝkjau, vidante neniun ĉirkaŭe, ekstartiĝis malrapide de sia kuŝejo, aliris al la mortinto, ekrigardis tiun ĉarman junulon, kiun li estis mortiginta mem kaj ekploris:

- "O, mia frato, filo de tiu nobla patrino, kial do ni frapis unu al la alia. Pli bone estus tion fari kontraŭ niajn reĝojn!"

Kaj li estis kovrinta lin ploregante tiom, kiom la ripozuloj vekiĝis. Klopodante ekstari, li relezis grave sian vundon en la gambo, tiom, kiom li ne povis plu stari surpiede sed ekfalis surteren kaj la vundo sangoverŝis. Pjeter Bala kaj du aliaj viroj portis lin kaj remetis en sian kuŝejon, kaj dezirante ŝanĝi la bandaĝojn sangumitajn petis al Sofi novan tolaĵon. Sofi prenis la sangumitajn bandaĝojn de ŝkjau kaj enmetis ilin en la sama loko kie ŝi havis la ĉemizon de sia filo. Eble ankoraŭ hodiaŭ ili pluestas tie. Post ses semajnoj la junulo resaniĝis, Sofi trovis por li gvidiston kaj kondukis lin sane ĝis Kolašin de Montenegro.



¹ Eksa politika prizonulo dum la komunisma regximo, trapasinta 24 jarojn en la prizono

² Montara regiono en la nordokcidenta Albanio

³ Tre vasta montara regiono cxe la landlimo de Albanio

kun Montenegro

⁴ Granda urbo nordokcidente de Albanio cxe la bordo de la samnomo lago

⁵ La fashista Italio estis okupinta Albanio ekde sepa de aprilo 1939

⁶ Renoma vilagxo tiuregiona

⁷ Figuro feina el la albana mitologio

⁸ Laspeco de albana brando

⁹ Laspeca populara medicinaĵo

¹⁰ Tiel oni vokas en Albanio serbojn

¹¹ Tiel oni nomas la serbokroatan en Albanio

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

Salutante Turkion el Kanado!

Antaŭ nelonge mia edzino kaj mi vizitis Otavon en Kanado, la ĉefurbo de nia lando. Oni povas vidi tiom multe en ĉi tiu bela urbo, ke oni facile povas perdiĝi. Post multaj horoj da sencela veturado tra sennombraj stratoj, ni subite vidis ion konatan: la turkan flagon! Vere, ni atingis la Ambasadorejo de Turkio. Tiutempe Turka Stelo aperis en niaj mensoj kaj la deziro konigi nian sperton kun la legantoj de la revueto.



La domo de la turka ambasadoro situas en tre bela urboparto. Ĝi reprezentas Turkujon kun fiero.


Krome, se vi zorge rigardas la altdekstran flankon de la foto, vi vidos acerfoliojn... la nacian symbolon de Kanado!

Ĉi tiu artikolo estas saluto el Kanado al Turkio!



verkis kaj sendis **marioo** el Kanado

Studante filozofion en Francio (1953-56), akompanis min en mia ĉambro ne personoj sed pendigitaj portretoj, inter kiuj unu de Nicolò



Nicolò Isouard



Busto de Nicolò Isouard



Napoleono



Tombo de Nicolò Isouard ĉe Père Lachaise

Isouard aŭ Nicolò de Malte kiel li mem skribis sian nomon, kiam li iris al Francio kun la francoj kiuj forlasis Malton, kiam Napoleono adiaŭis la insularon por iri ataki Egiption.

La maltanoj diris al la kavaliroj: "Sufiĉe nun. Vi ne estas plu kapablaj regi nin. Foriru. Sed tio ne sufiĉis. La kavaliroj, jes, fakte foriris, sed kun la helpo de la franca kavalir-grupo, kiu volis, ke ilia lando akaparui Malton.

Mi memorigu al vi, ke samtempe Nelson, la angla unuokula generalo, transiris la mediteraneon, atendante la finon de la franca kelkmonata supremacio en Malto, kio finiĝis ĝuste kiam la maltanoj petis lian helpon por forĉasi la malbon-kondutan francan soldataron, kvankam ĉifoje sen Napoleono.

Mi kredas ke, se la francaj soldatoj pli bone kondukis post kiam Napoleono liberigis Malton el la kavalira regado, mi kredas, ke Malto estus esinta en pli bonaj manoj ol sub la angloj. En tiaj specialaj cirkonstancoj, oni ĉiam uzas la vorton "Se...". Alie, iru peti la ĝustan respondon al Ŝia Historia Moŝto.

Nicolò naskiĝis en la ĉefurbo La Valeta la 30-an de majo 1775 kaj mortis en Parizo la 23-an de marto 1818. Li estis entombigita en la 12-an parton de la tombejo Père Lachaise en Parizo, vasta tombejo kie eterne dormas famaj nomoj kaj de la beletro kaj de la muziko, ktp.

Mi vizitis la lokon dufoje. Oni devas rondiri dum horoj kaj horoj por pli bone ĝui la lokon, kie regas ŝia Morta Moŝto. Kelkaj horoj ne sufiĉus.

Nicolò studis la muzikon en Parizo kaj ĝin li forlasis dum la franca revolucio. La francoj konsideras lin franco; ili pravas kvankam ne tute. Krom esti unu el la fondintoj de l'Opéra de Paris, li estis fama muzikisto

komponente diversajn operojn kaj aliajn mizukaĵojn. Lia Ĉefverko estas "Cendrillon" (Cendrulino), sed konata ankaŭ pro du aliaj operoj: "Joconde" kaj "Jeannot et Colin".

En Malto sub la regado de Grand Majstro de Rohan (1775-97), li estis muzikmajstro de la kavalira arta preĝejo 'Sankta Johano', dum la generalo Vaubois faris lin komisaro de la Teatro Manoel, la malta kavalira teatro.

Lia busto staras ĉe unu el la niĉoj de unu el la fasadoj de la pariza operdomo.

Krom diversaj stratoj portantaj lian nomon en Malto, la muzika asocio en Mosta, Malto urbo, honirigis lin portante lian nomon.

Pri tiu foto pendigita en mia ĉambro en Francio, se vi demandus min pri ĝia ankoraŭa ekzisto, mi bedaŭras diri, ke jam pasis multaj jaroj, kaj mia memoro riskas frezeziĝi eĉ pensante pri ĝi.

Post tio, sed jam antaŭ multaj jaroj, estante sanitara inspektoro mi sukcesis akiri de la franca ŝtato sesmonatan stipendion por studi hotel-administradon kaj manĝaĵ-higienon. Ĉi tiun kurson mi ĉeestis en Parizo, kien mi ĉiam revis viziti, ŝatata okazo por viziti precipe la operdomon kaj por serĉi la precizan lokon de la busto de nia malta muzikisto. Nu estas klare, ke mi sukcesis ĝin trovi kaj poste ankaŭ viziti lian tombon en la tombejo 'Père Lachaise'.

Pardonu min, mi ne nomas lin nur Nicolò aŭ Nicolò Isouard sed, kiel li mem skribis sian nomon, 'Nicolò de Malte', mia samlandano.



La enirejo de la malta ĉefurbo 'La Valeta'



La Pariza Operdomo



La muzikista domo en Mosta nomumita al Nicolò Isouard

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Ŝercoj



KIE ESTAS LA PROBLEMOJ?

Kruko havas zorgojn.

Jozefino: Ne forgesu, karuĉjo, sed ĉiuj viaj problemoj estas ĉi tie.

Kaj ŝi fingromontras sian kapon.

Kruko: Vi pravas, karinjo -- ĉiuj miaj problemoj estas en via kapo.

EN LA BIBLIOTEKO

Baniko estas en la biblioteko. Li prenas libron, sidiĝas por foliumi ĝin, kaj poste reiras por reloki ĝin sur breton. La bibliotekistino, s-ino Foliem, rimarkas tion: Pardonu, sinjoro, sed ni petas NE rebretigi la librojn, sed remeti ĝin sur la ĉareton.

Baniko: Ĉar vi kredas, ke mi estas kreteno, ĉu?

S-ino Foliem: Ne, ne, sinjoro; sed estas tiom facile misluki la librojn. Vidu mem, vi metas tiun kuirlibron en la vojaĝo-sekcion.

Baniko: Sed ja temas pri internacia kuirado!

PLI BONGUSTA KUKO

Jozefino prezentas ĵus bakitan kukon al Kruko: Kiu kuko estas pli bongusta? Mia kuko, aŭ la kuko de via patrino?

Kruko gustumas la kukon, zorge maĉas, kaj glutas.

Jozefino: Nu?

Kruko: Mi devas diri ke ĉi tiu kuko estas pli bongusta ol tiu de mia patrino.

Li aldonas: Mi devas diri tion, ĉu ne?

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com




Krucvortenigmo



DEKSTREN MALSUPREN:

1 – Vaz', kest'. 2 – Rusa virnom'. 3 – Ceremoniaj seĝoj. 4 – Unua parto de la kaŝita proverbo. 5 – Unu el la ĉambroj de duĉambra parlamento (rad.) – subtera provizej'. 6 – Kriple paŝos – metala elemento (lr). 7 – Estas neokupita, malplena – plano, skizo – persona pronomo. 8 – Malgranda – deziranta trinki – movi boaton per plataj iloj. 9 – Dua parto de la kaŝita proverbo – jarsezono. 10 – Membriĝis – kvina (lasta) parto de la kaŝita proverbo. 11 – Scienc' pri moralo – viraj vestaĵoj – saltanta amfibia bestet'. 12 – Kondiĉa subjunkcio – punkt', kie la terakso „trapikas“ tersurfacon – skribis mallongan memorigan resumon. 13 – Efektive ekzistantaj – malgranda lavpurigil'. 14 – Ruslingve „kiu“ – surmura papera tegil'. 15 – Kvara parto de la kaŝita proverbo. 16 – Kolektoj, sinsekvoj, ĉenoj. 17 – Intenca hommortig'. 18 – Kongresa Komitato.



MALDEKSTREN MALSUPREN:

9 – Esperantista Vegetarano (inicialoj de la bulteno). 10 – Malmola metal'. 11 – Komencas batalon. 12 – Interne – lasta vorto de preĝoj. 13 – Karakteriza manier' – spec' de poemo. 14 – Denove fariĝis (evit. formo) – blasfemi. 15 – Tria parto de la kaŝita proverbo – tuŝos per lipoj – ekvidu serĉatan aĵon. 16 – Unu part' de plurparta konkuro – planti detranĉitan branĉon – internaj. 17 – Aroj da doktrinadeptoj – donacaĵ' al diaĵo

– river’ en Rusio. 18 – Centra part’ – nom’ de dio en la Korano – rilataj al ŝatata kunulo. 19 – Rapidpaŝe moviĝi – kaŭzos impreson sentigantan la bezonon grati sin – ukraina havenurb’ . 20 – Nom’ de Jesuo – daŭra son’ – instrument’. 21 – Donas havaĵon al nov-edzino – respubliko sur la Araba duoninsulo. 22 – Loĝant’ de Japanio – disĵeti grajnoj sur kampon. 23 – Nomo de numeralo – numeralo. 24 – Birdo kun ronda

vostplumaro. 25 – Tute samaj. 26 – Kemia simbolo de stano.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

5. Mi estas nur ordinara pizeto

Tempestulo Strobilo daŭre tenis Glanon alkroĉitan al brika muro kaj antaŭ ĉiu matenmanĝo batis lin, per tio pligrandigante la filan apetiton.

De plenaĝuloj ne postrestis ankaŭ Strobilido. Amuziĝante li ĵetadis al la mizera senliberulo manĝorestaĵojn kaj pomronĝaĵojn, pafis al li per fruktferoj el kompoto kaj eĉ kraĉis, se forestis aliaj submanaj iloj.

Ne kompatis Glanon ankaŭ servistoj. Trovinte bonŝancon, ili ne pli malbone ol la sinjoroj verŝis sian koleron sur la katenigita senliberulo kaj adresis lin per la plej obscenaj vortoj. Dum kelkaj tagoj per la malbona volo de Strobilo Glano iĝis kvazaŭ rubujo, en kiun ĉiuj palacanoj ĵetadis ĉion, kio al ili mem aspektis malbela kaj malagraba.

Glano trasuferadis ĉiujn humiligojn kaj afliktojn, sed ĉiuminute li ne perdadis la esperon fuĝi. Apenaŭ ĉiuj palacanoj ekdormadis kaj la gardistoj subtenante sin sur lancoj ankaŭ dormetadis, li senprokraste ekgrapadis siajn katenojn en akran ŝtonon. Sed ĉio vanis. La gardistarestro Eglanterio observis tion kaj ordonis ŝanĝi la malnovajn katenojn per novaj kaj ordonis al la gardistoj-eglanteriidoj de sia taĉmento rememorigi Glanon:

- Ĉi-tie ĉiuj vivas kaj mortas nur laŭ la bonvolo de sinjoro Strobilo.

La eglanteriidoj promenadis antaŭen kaj malantaŭen kun akraj lancoj surŝultre kaj ĉiutage kelkfoje rememorigis Glanon, laŭ kies volo li devas sperti tiajn suferojn. Tamen Glano tutegale ne pensis pri kapitulacio: li ekprovis elmovigi la muran ringon. Sed tion ankaŭ rimarkis Eglanterio. Li ordonis alkroĉi Glanon al nova ringo.

Unufoje, kiam Glano enpensiĝinte kreadis novajn fuĝplanojn, io kriante elflugis tra la fenestro, kelkfoje renversiĝis transkape kaj bumfalis ĉe liaj piedoj. Kliniĝinte Glano en mallumo ekvidis malgrandan rondan vivestaĵon kun hirtiĝinta flaveta hartufeto. Apenaŭ aŭdeble li ĝemadis kaj petkriis pro patrina

helpo.

Ne perdante tempon, la filo de Kverko kaptis folion de Konvolvulo kaj skufaligis la plej grandan rosguton sur la kapon de la falinto.

Reviviginte lin, li demandis:

- Kio vi estas?

- Pizo.

-Kaj kial vi saltadas tra la fenestro, se vi povas trairi la pordon sen iaj frapiĝoj.

- Akvokreso min elĵetis.

- Kion vi faras en ĉi abomena palaco?

- Min kaptis eglanteriidoj, kiam mi laboris en la kampo kaj pelis min por amuzigi tiun malpuran fanfaronantan Akvokreson.

- Kaj batante min, ili timigas lin,- plendis Glano.

- Ili ĉiam tiel kondutas. Por mi tiu maltaŭgulo brakojn kaj gambojn elturnadis, enfosadis en teron, en klakiloj klakadis, kvazaŭ mi estus ne viva estaĵo, sed ia ludilo. Bonaj infanoj eĉ kun ludiloj tiel ne kondutas. Kaj kio estas vi?

- Mi estas Glano Kverko, fama verkisto kaj doktoro de verkadsciencoj.

- Kaj mi estas nur ordinara Pizeto, - peze ekspiris li kaj mallevigis sian kapon. – Mia patro en la vilaĝo estas nomata Rapidulo.

- Do, eble vi estas sportisto?

- Ne, nur kiam malfeliĉo minacas.

Al Glano plaĉis la sincereco de Pizeto kaj li proponis:

- Se vi volas, mi titolos vin kurĉampiono.

- Mi ne bezonas tion. Sed kia mirinda estas via ĉapo!

- Nu, la ĉapo por mi estas bezonata, ke miaj belegaj pensoj rapide ne malvarmiĝu, - fanfaronis Glano.

- Ho! – miris Pizo kaj reekspiris. – Verŝajne vi estas tre prudenta.

- Kompreneble, sed eĉ pli mi estas forgesema,- eĉ nepalpebruminte blagis Glano. – Tamen nune ĉi-tio ne gravas. Vi, virĉjo, ŝajnas esti nekatengita?

- Ne, nenia ligilo sin tenas sur mi.



- Tio estas bonega. Tiukaze vi helpos al mi fuĝi.
- Ne, pro nenia rekompenco. Ĉu vi konas, kion signifas la kolero de Strobilo? Li dishakos nin vivajn kaj fordonos al kokinoj kiel bekmanĝon.

- Ĉu tiu erinacfela vagabondo? Tiu kurbgamba dikulo? Vi ne vidis, kiel mi frapis en lian subripejon. Li eĉ gambojn suprenlevis!

- Do, pro tio vi sidas katenigita.

- Bagatelaĵo. Tamen mi konas pro kio.

Ili ankoraŭ ne estis amikiĝintaj, sed jam estis ekkverilintaj kaj ambaŭ sidis orgojliĝintaj. Pizo estis unua, kiu ne eltenis:

- Estas facile por vi paroli. Kaj ĉu vi scias, ke tiu Strobilo estas la gardestro de la Lando de Malvirtoj? Li kun siaj eglanteriidoj povas ne nur mortpafi vin, sed ankaŭ peladi vin laŭmure ĝis kiam viaj piedoj tute forfrotiĝos. Li povas nin farunigi, li povas fermentigi nin por kvaso... Multegon li povas... Li estas pli terura ol besto.

- Do, des pli ni devas fuĝi.

- Mi provis, sed nenio efikis: unuflanke estas maro, sur la alia – rivero, sur tria – monto kaj nek ereto da ebenaĵo.

- Kaj kio estas sur la kvara flanko?

-Vi eĉ ne demandu. La plej maltaŭga ŝanco en la mondo – tie estas arbaro. Kaj ĝi estas tiel densa... Estas dubinde, ke ni trapenetru ĝin.

- Mi estas al kutimiĝinta al arbaroj. Kaj ĉu la arbaro direktiĝas al la suno?

- Jes, al la suno. Tamen birdoj tie abundegas.

- Malgraŭ tio ni devas fuĝi.

- Do, ni fuĝu,- Pizo ekstaris kaj tuj refalis teren.

Glano surkuŝis lin.

- Ĉi tie ĉiuj vivas nur pro bonvolo de sinjoro Strobilo, - diris preteriranta gardisto.

- Kia vi estas malsingardema,- ŝvebis Glano al la timiĝinta amiko.- Kaj kiu elkatenigos min?

- Vi estas doktoro, do vi pensu,- ŝultrotiris Pizo.

- Mi jam pripensis. Vi singarde ruliĝu en la Strobilan dormoĝambro kaj ŝtelu lian ŝlosilon. Li tenas ĝin sub la kuseno.

Glano levis la komplotiston, tiu kaptis la Konvolvulan trunkon kaj rampis supren. Tuj Pizeto malaperis en la malhela fenestra truo. Glano atendis por la reveno de la amiko, sed neniel povis ĝisatendi. Eltirinte la orelojn li aŭskultis ĉiun kraketon, ĉiun plej malfortan noktan sonon. Lia koreto tiel frapis, tiel bruis, ke li estus vekiginta plej proksime starantan gardiston, se ne estus je taŭga tempo silentiĝinta.

- Dormas kvazaŭ per neĝo kovrita, - unue aŭdiĝis la voĉo de Pizeto, poste aperis lia gaja hartufeto kaj finfine aperis li mem.

Glano ĉirkaŭbrakis lin kaj ne deziris plu forlasi,

kvazaŭ li estus teninta la realan liberecon en siaj manoj.

- Kaptu la ŝlosilon, - ne cedis la karesata Pizo.

- Vi nenion komprenas, vi nenion konas, - plue ne forlasis lin Glano. – Por la unua fojo en mia vivo mi ekhavis amikon! Por la unua fojo!

- Nu bone, bone. –Pizo tuj malŝlosis la katenojn kaj deziris ĵeti ilin apud la muro, tamen Glano haltigis lin kaj ĵetis la katenojn sur sian ŝultron.

- Pro kio vi bezonas ilin?- miris Pizo. – Ili ja tintos.

- Ĉu mi, havante liberajn manojn kaj tian amikon, ne venĝos tiun kruelan Strobilon? Vi ne sufiĉe bone konas min.

- Ni trafos malsukceson, - tremis Pizeto. – Vi pensu ankaŭ pri mi.

- Tiam pli bone vi rekatenu min, - diris Glano.

- Vi konas pli bone, vi estas doktoro,- cedis la amiko.

Pretere iris duondormanta gardisto kaj avertis ilin:

- Ĉi-tie ĉiuj mortas nur pro la volo de sinjoro Strobilo.

La komplotistoj supreniris la perlamotan ŝtuparon kaj silente treniris laŭ la sukcesaj koridoroj de la palaco.La dormoĉambro de Strobilo ne devis esti longe serĉata: tra la pordo aŭdiĝis forta, tremiganta la plafonon ronkado.

La gardistoj eglanteriidoj en la koridoro per altaj voĉoj akompanis sian estron.

La amikoj silente enĉambriĝis. En unu lito kun ŝveliĝinta ventro dormis Strobilo kaj sur la alia - kurbiĝinta Pinglino. Glano singarde ŝteliris kaj eĉ pli singarde katenigis iliajn gambojn. Poste li ĉirkaŭrigardis por trovi Akvokreson.

- Ni kuru for, - tiritis lin Pizo, kaj ambaŭ paŝetis en alian ĉambron ,kie dormis Akvokreso. Eĉ ĉi-tie Glano ne eltenis ne farinte spritaĵon. Tre rapide li trovis sian kajeron, inkon kaj plumon, maceris fingron en la inko kaj pentris ruĝajn lipharojn al la malgranda maltaŭgulo.

Atinginte la korton, la amikoj kuris al la fonto de gasakvo, dronigis la ŝlosilon de la katenoj, ŝovis sin tra la eglanteria heĝo kaj ekkuris en la direkton de la ruĝiĝanta ĉielo.

Nur post la sunleviĝo la gardisto spertis pri la malapero de Glano. Tuj li ekigis teruran bruegon.

- Fuĝis! Fuĝis! – kriegis li frapante per la lanĉfinaĵo pendigitan paton.

Ekaŭdinte la kriegon, Strobilo saltis al la pordo, kaj Pinglino al la fenestro, tamen ambaŭ falis sur la plankon. Kuŝante ili pensis, ke iliaj gamboj estas tirataj. Tiam Strobilo saltis al la fenestro kaj Pinglino al la pordo. Kaj ree ambaŭ falis kvazaŭ morthakitaj.

- Helpu! – kriis Pinglino.

- Pardonu! – muĝis Strobilo

Vekiĝinte, en ilian ĉambron ankaŭ alkuris la eta maltaŭgulo Akvokreso. La gepatroj, ekvidinte liajn ruĝajn lipharojn, pensis pro sango, do tiel forte kuregis al sia filo, ke falinte, ambaŭ elartikigis siajn gambojn. Kurante tien kaj alien, ili vundis siajn fruntojn kaj flatigis la nazojn.

Ilin, kuŝantaj en tia pozo, trovis la gardistarestro Eglanterio.

- Kuratingu ilin! – kriis al ili bluiĝinta pro kolero Strobilo.

- Malŝlosu! – ne cedis flaviĝinta Pinglino.

- Kuratingi!, - ordonadis Eglanterio. – Malŝlosi!

Kaj la eglanteriidoj kuradis tien kaj alien, ĝis kiam

tute tediĝis kaj falis surteren por ripozi.

- Malŝlosu! - nur post longa horo, kaptinte Strobilon je la haro, finfine venkis Pinglino.

Ĉiuj korteganoj ekserĉis la ŝlosilon, sed ĝi estis nenie trovebla. Kaj la ŝlosilo sinkadis pli kaj pli profunden en la senfundan fonton de gasakvo.

(daŭrigota)

"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Poezio - Espopore

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad

Kvar elementoj

I Subtera sekreto

Kio kaŝiĝas en profundo,
Sub premo de la prapremis' ?
Sekret' radikas en ĉi grundo,
Kio kaŝiĝas en profundo?
Skeletoj luksaj en abundo,
Ĥtonikaj ĵigoj kaj turkis' ...
Kio kaŝiĝas en profundo,
Sub premo de la prapremis' ?

II Maro

Per si kovradas tutan spacon
Velura flustro de la mar' .
Persik' okupas la subtason --
Per si kovradas tutan spacon,
Sur strando restas dolĉa paco
Kaj sur liparo -- nur amar' ...
Per si kovradas tutan spacon
Velura flustro de la mar' .

III Antaŭ flugo

Aera itiner' serpentas
Per venta ĝojo de liber' .
Ĉi antaŭĝuo nun torentas;
Aera itiner' serpentas
Kaj aloj ŝtalan forton sentas,
Kaj likvas punco de vesper' .
Aera itiner' serpentas
Per venta ĝojo de liber' .

IV Kandelo

La flamo flagras en mallumo,
Flirtadas ombroj sur la mur' ...
Vi volis iri ĝis resumo,

La flamo flagras en mallumo
Malvarmas de la mort' brakumo
Fumetas de la vivo spur' .
La flamo flagras en mallumo,
Flirtadas ombroj sur la mur' ...

Espopore

Arbara rondelo

La verdo vepras per mister' ,
Kviet' ripozas en la ombro,
Kie ĝin kovras dorma sombro.
Ventetas nur, preter ceter' ...

Tapiŝon sternas al la ter'
Enorma da ĉi floroj nombro.
La verdo vepras per mister' ,
Kviet' ripozas en la ombro.

Sub branĉoj helas Primaver',
Kaj trunko staras, kiel kobro.
Knabino plukas. Pendas korbo,
Dolĉegas la amara ber'
La verdo vepras per mister' .

Espopore

La viviĝinta gravuraĵo

Ĉu estas tio vero aŭ deliro?
Sur gravuraĵ', en la dormej'
pendanta,
Turniĝis kapo de la kavaliro...

Kaj kvazaŭ ekflugadis brava kanto,
Foliumante vekajn glorajn venkojn
En dika de l' memoro folianto.

Elbatas oni kojnon nur per, ve,
kojn' !
Kie sonoris tim', nun tintas glavo.
Navedas pensoj, la haringaj
benkoj.

En la okuloj mutas pura ravo...
Ĉevalo lia prancis tute trafe:
Frakasis tiun kadran kupran favon.

Kaptito al liber' sin ĵetis pafe;
Tra la barilo portis sian dignon,
Malpleno restis faŭki cenotafe...

Espopore

poemoj de **Evgenij Georgiev**
el Kazahio

Speciala Premio en Poezio



La esperantistoj estas bonkoraj, gastamaj, honestaj, tamen infane fidemaj homoj. Ili ĉiam pretas akcepti samideanojn. Mi ŝatas viziti ilin. Antaŭ nelonge mi vizitis familion de Aldona kaj Simeono, la membroj de loka Esperanto klubo. Kutime mi venas antaŭtagmeze kaj sidiĝas en kuirejo... Kaj eĉ ne intencas komenci parolon. Mi malmulte konas familion de Aldona kaj Simeono, kaj estas eĉ nenio por paroli. Tamen ne tiom malmulte ni estas konataj, por ke ili forpeli min. Ni sidas silente. Post iom da tempo ni komencas nervoziĝi.

– La vetero estas bona, ĉu ne? – komencas paroli Aldona. Mi rigardas tra la fenestron.

– Kia ĝi estas tiu vetero, tia ĝi restu, – malfermas buŝon mi.

– Trevor Steele, – ekparolas Simeono, – verkas novan libron pri esperantistoj...

– Verku li, – eklevis ŝultrojn mi.

– Necesas, ege necesas verki pri bonaj homoj kaj pri iliaj bonaj laboroj. Sed esperantistoj ne legas librojn, – parolas Simeono.

– Kaj bone faras, – rediris mi. – Nun verki libron povas iu ajn. Legu librojn la verkistoj.

Simeono ĉion komprenis kaj nenion plu demandis. La mastroj eksilentis. Ili provis komprenigi min, ke mi malhelpas, ĝenas ilin. Nome pro tiaj provoj mi sidas ĉe ili. Mi scivolas ekscii, kiel sukcesas al ili. Parolas ili sensencaĵoj iajn, sekve ili hejme havas multe da laboro kaj zorgoj. Mi memorigas al ili rusan proverbon: „se vi volas labori, ekkuŝiĝu por iom da tempo, kaj via deziro eklabori ĉesos“... Mi ridas sola.

– Mi legis en libro... – komencas Aldona.

Mi ŝvingis permane.

– Kia utilo estas de tiuj libroj... nur kapdoloro... – rediris mi.

– Staseo forlasis esperantistan klubon kaj ne revenis... Kien li foriris? Pro kio ne revenas? – interesiĝas Simeono.

– Ĉu mi ne diris al vi, ke tiel okazos al ĉiuj esperantistoj! – rediris mi. Ŝajne al mastroj miaj vortoj ne faris impreson. Oni necesus kapti min je nuko kaj forpuŝi surstraten. Tamen ne... Tiel difektigas esperantistojn la frateco – interna ideo!

– Jen Salomono ne plu estas inter ni, – parolas Simeono.

„Ruza estis tiu Salomono.“ – mensis mi, sed voĉe mi diris ion alian: – Salomono estis bona esperantisto.

– La plej bonaj mortas unue, – klinis kapon Simeono.

„Tio estas krudeco...“ – ekpensis mi, sed voĉe

diris: – Ni ĉiuj mortos...

– Ĉu vi volas spekti televidilon? – demandis Simeono.

– Televidilon mi havas, – respondis mi.

– Eble vi volas foliumi PIV-on?, – ne ĉesas Simeono.

– Kaj PIV-on mi vidis – arogantas mi.

– Nenion pli mi povas montri al vi. Mi havas nur hemoroidon. Sed tio ne imponos vin: – ofendiĝis Simeono.

Mi ruĝiĝis, nesciante kion respondi, poste mi ekpeticis: – Ĉu vere? Bonvolu montri. Simeono montris al mi trifingraĵon. Mi kapklinis.

– Pro kio vi malhelpas, pro kio vi malpermesas al ni vivi? Kion malbonan ni faris al vi? – koleras Simeono.

Mi dezirus multe demandi, sed kiel ĉiam mi konfuziĝas kaj ne trovas taŭgajn vortojn. Pro tio mi okupiĝas per propraj aferoj. Mi elektas hazardan telefonnumeron sur mia poŝa telefono. Sin aŭdigas iu sinjoro.

– Mi scias, kion vi faris pasintsemajne! – anoncas mi.

– Nuuu..., Jaaa... – balbutas tiu. – Kion?

– Mi venos al vi kaj diros. Tiu provas ion klarigi. Mi elŝaltas telefonon. Nenien mi veturos. Mi eĉ ne scias, kun kiu mi parolis. Al mi gravas, ke homo ekcerbumu. Tio estas jam bona signo. Mi elektas kelkajn aliajn telefonnumerojn. Tiaj interparoloj prezentas al mi multe da bonaj emocioj.

Sed vizaĝoj de Aldona kaj Simeono tamen pli malgajiĝis, verŝajne jam vesperiĝis. Necesis ilin ĝojigi.

– Do mi jam iros, – kaj mi ekstaris. Kiel sereniĝis iliaj vizaĝoj! Kaj kiel agrablas al mi, ke mi povas al la homoj havigi multe da ĝojo. Aldona ekridis pro larmoj.

– Vi estas ege bona homo, – diris ŝi.

– Ĉu vi certe scias? – interesiĝis mi.

– Ho jes! – ekkriis ŝi.

– Sed tuj vespermanĝo, – diris mi. Kaj mi denove sidiĝis.

– Vi kion permesas al vi?! – tra la dentoj diris Simeono. – Ĉu vi per balalajkoj okupiĝas?!

Kiom larĝa estis la skalo de emocioj sur iliaj vizaĝoj! Kaj tio ĉi estis mia merito. Mi kreskas en miaj propraj okuloj kaj mi sentas min ĉiam pli bone. Tiam mi ekstaris kaj foriris kaj aŭtuna vespero ankoraŭ ne ŝajnis malluma.


verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Valoraĵo el Koreujo: la siĝo

Se azianoj scius, kiom malmulte oni instruas pri Azio, pri ĝiaj historio, geografio kaj literaturo, en okcidentaj lernejoj, ili rajtus plendi pri kultura diskriminacio. La amas-komunikiloj en okcidentaj landoj tre malmulte parolas pri aziaj problemoj, kiuj ne rilatas al la okcidentaj interesoj.

Ni pensu hodiaŭ pri Koreujo. Certe kun granda surprizo niaj okcidentaj legantoj ekscios, ke laŭ la legendo ĝi ekestis en la jaro 2333 antaŭ la komuna erao. Kompreneble tio estas legendo, sed ĝi okazis 1000 jarojn antaŭ la legenda milito de Trojo. La nomo Koryeo unue aperis en la 10-a jarcento k.e. (de la komuna erao) por la lando, kiun la koreoj mem nun nomas Chosen norde kaj Hanguk sude.

Sed mi ne volas paroli pri tio. Mi volas paroli pri io, pri kio vi certe ne scias, pri la siĝo. Multaj esperantistoj konas la japanan poemformon hajko kaj eĉ mem verkas hajkojn, sed ili apenaŭ konas la korean siĝon.



Siĝo [시조 en la korea] estas poemo kun tri versoj, kiuj meznombro havas po 14-16 silabojn, kaj do entute 42-46 silabojn. Se oni konsideras ke ofte unu silabo estas unu vorto en la korea, oni komprenas, ke oni povas diri tre multe per 42-46 silaboj. La unua verso prezentas temon, la dua evoluigas ĝin, kaj la tria finiĝas kutime en iom neatendita maniero.

Prelego en Esperanto pri la siĝo okazis dum la Universala Kongreso en Londono en 1971 fare de GIM Taekeng, kiu poste ankaŭ verkis libron Elektitaj siĝoj de Nosan aperintan en 1976. Ĝi ne plu estas aĉetebla, sed nun oni laboras por reeldoni ĝin.

Nosan estas konata korea poeto, kies vera nomo estas LI Unsang. Jen longeta poemo, nomata “moderna siĝo”, kiu rezultas el tri kunigitaj siĝoj, tradukita de GIM Taekeng.

Volu iri

*La hejmloko maro suda; Min aperas mar' lazura.
Eĉ en song' ne malaperas mar' hejmloka la kvieta.
Nun marbirdoj flugas tie; Volu iri, volu iri!*

*Mi sopiras knabojn junajn, kiuj kun mi ludis kune.
Ĉu forgesi povas ilin, eĉ se kien ajn mi iras?
Kion faras ho nun ĉiuj, volu vidi, volu vidi!*

*La marbirdoj, bubaj knaboj ĉiuj restas en hejmloko.
Kial, kaj por kion fari de l' hejmloko for mi loĝas?
Forĵetante ĉion ĉe mi, mi revenu, mi revenu!*

Kaj jen vere tradicia siĝo, kiun mi mem esperantigis helpe de angla traduko kaj kontrolo de koreaj esperantistoj:

Montoj estas malnovaj

*Montoj estas tre malnovaj, akvo daŭre estas nova
tage-nokte akvo fluas – ĉu malnova povas esti?
Grandaj viroj samas akvon, ambaŭ iras sen reveno.*

La verkistino de la originalo estis: 황진이 HŬANG Ĝini, kiu vivis dum la jaroj 1506-1567 (proksimume). Ŝi estis giseng, tio estis talenta virino, kiu kantis, dancis kaj ludis tradiciajn muzikilojn. HŬANG Ĝini havis talenton pri poezio, do ŝi verkis plurajn siĝojn.

En tiu siĝo la vortoj “grandaj viroj” havas kaŝitan signifon. La verkistino amis viron, kiu estis fama saĝulo, nome SO Gjongdok. Poste ŝi studis ĉe li. Post lia morto ŝi suferis, sciante ke li neniam revenos.

Renato Corsetti kun helpo de Namsuk LI

PRI LA VERKINTOJ

Renato Corsetti estas italo, nuntempe loĝanta en Britujo, eksa prezidanto de TEJO kaj poste de UEA. Li nuntempe regule instruas Esperanton al grupo, kiu konsistas plejparte el aziaj esperantistoj, kaj komencas mem malkovri ilian kulturon.

Namsuk LI estas korea esperantistino, kiu loĝas en Seulo, Koreujo. Partopreninte la 100-a Universalan Kongreson en la jaro 2015, kun grandaj miro kaj interesiĝo ŝi esperantistiĝis vole kaj gaje.

Piednoto: Korea familia nomo normale aperas antaŭ la persona nomo. Ni aperigis la familiajn nomojn per grandaj literoj.

NOVAJ VORTOJ

bubo: knabo malbona kaj senrespekta.

diskriminacio: maljusta traktado de difinita homo aŭ homgrupo, tiel ke oni traktas ilin malpli bone ol aliajn homojn.

el-doni: produkti kaj publikigi verkon.

erao: tempo-periodo.

geografio: scienco pri nia Tero, pri ĝia aspekto kaj pri ĝiaj regionoj kaj landoj.

kvieti: tute trankvila, paca, ne montranta fortajn emociojn.

lazura: hel-blua koloro de la ĉielo aŭ maro.

legendo: rakonto pri malnovaj okazaĵoj, en kiu la historiaj faktoj estas intermiksitaj kun imagitaj mirindaĵoj.

proksimume: ne tute ĝuste, sed nur proksime al la

ĝusta; ne precize, pli-malpli, ĉirkaŭ.

silabo: parto de vorto, ekzemple la vorto "saluton" havas tri silabojn: sa-lu-ton.

sonĝo: bildoj kaj ideoj, kiujn oni vidas aŭ spertas dum la dormo.

sopiri: forte redeziri ion perditan; suferi kaj malĝoji pro iu forta deziro.

surprizo: miriga kaj neatendita okazaĵo.

talenta: kun apartaj, rimarkindaj kapabloj

verso: unu linio de poeziaĵo.

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-si%C4%9Do/>

Hobojisto en Istanbul

verkis kaj sendis Axel Vincent el Francio

Mi faris miajn muzikajn studojn ĉe CNSM (Konservatorio Nacia Supera Muziko) en Parizo. Je 21 jaroj, kun mia hoboja premio, mi estis tie kaj devis pripensi mian estontecon. Kion fari? Nature kariero kiel muzikisto. Sed kiel? Kiel hobojo ne ekzistas multe da alternativo. Aŭ instruante aŭ ludante en orkestro. Krome mi revis vojaĝi, sed ne kiel turisto sed loĝi en la lando kaj esti en kontakto kun la loka loĝantaro.



Kiam la greka dirigento Dimitri Ĥorafas, kiu loĝis en Parizo, organizis varban konkurson por posteno de ĉefa hobojo por la Tesalonika Ŝtata Orkestro, mi prezentis min kaj havis la ŝancon gajni ĉi tiun konkurson.

Do jen mi, 21-jara, survoje al Grekujo, kun miaj muzikaj instrumentoj kaj miaj partituroj. Mia unua impresio, kiam mi surteriĝis en Tesaloniko, estis la suno, kiu tre mankis en Parizo. La lumo kaj ankaŭ la varmego! Estis somero 1971 kaj tiu jaro estis tre varme en Makedonio.

Sed feliĉe, ankaŭ tre amika estis la akcepto, kiu igis min la grekaj muzikistoj, miaj novaj kolegoj. Mi estis la plej juna muzikisto en ĉi tiu granda simfonia orkestro, kiu nombris 90 muzikistojn. Kiel la unua hobojo, ĝi estis granda respondeco sed ankaŭ fascina aventuro. Post jaro kaj multaj koncertoj, mi akiris bonan reputacion en la regiono.

Unu el miaj revoj tiutempe estis viziti Istanbulon. Sed kiel? Mi ne volis viziti ĉi legendan urbon per buso kun miloj da turistoj ĉirkaŭ mi. Unun tagon, mi ricevis telefonvokon de la Istanbula Operejo. Muzikisto vundis

sian manon, kaj li rekomendis min anstataŭigi lin por kelkaj spektakloj de „Nozze de Figaro“ de Mozart. Akcepti estis malfacila decido, ĉar mi neniam antaŭe ludis operojn kaj ĝi tre diferencas de ludado en simfonia orkestro. Sed temis pri Istanbul kaj Mozart... Do mia respondo estis nature pozitiva!

Nezih, la muzikisto, kiu rekomendis min, atendis min ĉe la istambula stacio kaj veturigis min al mia hotelo, ne sen antaŭe igi min gustumi mian unuan "Kaymakli künefe" kun teo.

En Francio, oni ofte spertas konkurencon ene de orkestroj kaj tio malfaciligas la laboron por komencanto. En Turkujo ĝi estis tute alia. De la unua kontakto, mi sentis la bonkorecon kaj solidarecon de la istambulaj muzikistoj. Do ĉi-semajne ĉe la Istanbula Operejo perfekte funkciis kaj estis por mi granda ĝojo kaj granda honoro povi partopreni.

Mi eĉ ne parolas pri la senfinaj ĉiunoktaj festoj, post la spektakloj, kun multaj lokaj muzikistoj. Mi neniam forgesos la ekstreman bonkorecon de ĉiuj ĉi tiuj muzikistoj kaj mi sentis min hejme en Istanbul.

Mirinda homa sperto!

verkis kaj sendis **Axel Vincent** el Francio



"Biciklo estas lanta morto de la planedo"

tradukis kaj sendis
Lenke Szász el Rumanio

Tion dirinta, bankiero pensigis ekonomikistojn:
„Biciklanto estas katastrofo por la ekonomio de lando:

Li ne aĉetas aŭtomobilon kaj ne pruntepetas monon por aĉeti ĝin. Li ne pagas asekuron, ne aĉetas benzinon, ne pagas por la revizio kaj por la necesaj riparoj. Li ne uzas pagatan Parking. Li ne kaŭzas gravajn akcidentojn. Biciklanto ne bezonas aŭtostratojn kun pluraj bendoj. Li ne grasiĝas. La sanaj homoj ne estas necesaj, nek utilaj por la ekonomio. Ili ne aĉetas medikamentojn. Ili ne iras al hospitalo aŭ al kuracistoj. Ili aldonas nenion al la GDP de la lando.

Dume, ĉiu nova vendejo Mc. Donald's kreas almenaŭ 30 laborlokojn, fakte 10 korkuracistojn, 10 dentkuracistojn, 10 fakulojn pri dieto kaj pri nutrado kompreneble ankaŭ laborantojn en la koncernaj vendejoj.”

Pripensu: Ĉu elekti biciklon aŭ Mc. Donald? La elekto estas pripensinda.

P.S. La piedirado estas eĉ pli malbona. La piedirantoj ne aĉetas eĉ biciklon!

Elrumanigis **Lenke Szász**



FERVOJSTACIO

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario

Soleca mi estas
Inter
tiom da homoj.
Vespera lacego!
Okulojn mi fermas
kaj denove ekveturas
per trajno,
la trajno de miaj homrevoj.
Jen stacidomo –
la trajno haltos
dum kelka tempo.
Ĝi prenos homojn
portantajn surŝultre
iliajn tagojn.
Aliaj- elvagoniĝos –
iliaj vojo estas finite.
Alvenas ĉi tien.
Kaj denove la vagonaro
ekveturos sur la trako malnova.
La lokomotivo reklučos
la unuan
kaj poste duan kaj trian.
Kaj denove ĝi spiregos
ĝis la sekvonta fervojstacio.
Tie atendas ĝin
la homoj kun espero,
amo kaj revo.
Sed mi kurbiĝos

sur la lasta sidtabulo,
kaj rigardos feliĉajn,
kontentajn kaj geamantajn homojn
ekportante la revojn kaj impostojn
al ilia fervojstacio.
Malmulte estas la tempo
por mi
de kie la vagonaro
ekveturos sen mi
sur la eterna trako malnova,
por ke elvagoniĝu
kaj envagoniĝu la homoj.
La homoj de la estonteco!



verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova**
el Bulgario



un tagon la malsata tigro renkontas cervon en arbaro. La tigro tre deziras ĝin formanĝi. Sed malfeliĉe la tigro neniam vidis cervon escepte tiun ĉi fojon, tial ĝi tute ne scias, kian kapablon havas cervo, kaj ĝi sin proksimigas al cervo maltrankvile.

“Kio tio estas staranta sur via kapo?” Demandas la tigro.

La cervo ja scias, ke la tigro havas malicon kontraŭ ĝi.

“Ve, malsaĝulaĉo!” Svingante siajn kornojn la cervo respondas “Ĉu vi ne scias eĉ miajn manĝobastonetojn, kiuj mi surmetas sur mia kapo?”

“Kion do vi faras per ĝi?” Demandas la tigro.

“Ha, ha, kompreneble por preni la viandon, kiam mi kaptas tigron.” Ridante respondas la cervo.

Aŭdinte tion la tigro iom estas konsternita, kaj sekve ĝi klinas sian kapon malsupren, ĝi hazarde trovas ion pendantan sub la ventro.

“Por kio vi uzas ĝin?” Demandas la tigro.

“Malsaĝulaĉo ĝi estas saŭcujo, en kiu mi metas iom da saŭco por gustigi la viandon de tigro.” Diras la cervo.

La tigro pli kaj pli konsterniĝas aŭdante tion. Poste ĝi observas la tutan korpon de la cervo, ĝi trovas mulajn punktojn dislokatajn sur tuta korpo de la cervo, kaj la tigro demandas. “Ĉu vi povas diri al mi, kio estas la punktoj, kiuj troviĝas sur via korpo.”

“Ho, jes, la punktoj estas signoj, kiuj ekaperiĝas ĉiufoje, kiam mi manĝas tigron. Dio permesas, ke se mi povas manĝi milon da tigroj, li promocios min “estro de bestoj”, kaj nun nur unu al mi mankas por atingi tiun nombron!” Fiere la cervo respondas.

Tial la tigro pli detale rigardas ĉiujn punktojn: Ho, ve! Ili aspektas tiu, kiu jam multon formanĝas. Kaj fine ĝi atingas al konkludo, ke cervo estas terura estaĵo por ĝi. Malgraŭ ke la diro estas tiel kuraĝa, la cervo interne vere estas ja tre timega, kaj ĝi ne povas sin teni de tremo de la korpo pro timo. Lia korptremiĝo estas tuj rimarkata de la tigro.

“Kio okazas ĉe vi? Ĉar via korpo tremas tiel terure!” Demandas la tigro.

“Aĉulo! Ĉu vi ne komprenas tion, kio estas antaŭ-

tremiĝo, ke mi tuj volas manĝi tigron?” Diras la cervo.

En tiu ĉi momento la tigro konscie eksentas, ke ĝi nun enfalas en danĝera stato. Jen ĝi sin turnas kaj rapide forkuras per sia tuta forto. Post longa forkurado, la tigro renkontas simion. Kaj ĝi rakontas ĉion al simio, kio okazis al ĝi.

“Ha, ha! Stultulo! Vi estas trompata, mi malkaŝe diros, ke cervo estas nenio alia ol nur malfortulo, ĝia viando estas la plej bongusta. Do ni reiru, kaptu kaj formanĝu ĝin kiel nian manĝaĵon?” Ridante proponas la simio.

“Ve, malsaĝulo! Ne iru. Ĉar mi timas, ke vi certe ekkuros ĉe unu vido.” Respondas la tigro.

“Ne timu pri tio, sed se vi timas, de mi trompas vin kaj forlasas vin al cervo, ni do ligu nin per volvtrunketo de glicino.” La simio diras, kaj tuj detiras unu volvtrunketon ĝi igas unu finiĝon ligiĝi ĉe la kolo de tigro kaj la alia ĉe sia mano. Ĝi iras antaŭe, kaj la tigro sin sekvas. Tiu ĉi sceno estas kvazaŭ kampara knabo tiras bovon.

La cervo antaŭ restadas tie kaj estas manĝanta bambufoliojn por plenigi sian malsatan ventron. Kiam ĝi ektrovas, ke la simio alvenas tirante la tigron, ĝi tuj kriegas per laŭta voĉo.

“Fi! Simidaĉo! Dekok tigrojn via patro ŝuldas al mi, kiel vi scias, nun vi tiras unu por redoni, ĉu ne? Tuj rapide donu al mi, ĉar mi nun estas tre malsata, nu rapidu! Rapidu!”

Apenaŭ aŭdas tion la tigro sin turnas, kaj forkuras laŭ sia povo.

Ĉar la simio ne povas tiel rapide sekvi la tigron, tial fine la simio estas tir-mortigita!

Sed la tigro forkurante insultas, “Ruzulo vi estas! Ruzulo

El Tainan Esperanto Societo, 1934, “La Verda Insulo”, 2. Li Bichhin [Biĉin] troviĝis en Japanujo.

Esperantigis: **So Ŝjo Lin** [莊松林, zhuāng sōng lín]
Havigita de tajvana esperantistino **Liru Chen** pere de **Renato Corsetti**

**Malnova nomo de Tajvano en japana kolonia periodo*



ANTAŬPAROLO

Karaj katemuloj, Mi volas prezenti al vi la homon, kiu pentras la Katajn historiojn. Mi neniam lin vidis, sed mi konas lian grandan bonan koron. Dio donacis al li diversajn talentojn, kiel el abundokorno – li estas verkisto de multaj libroj, pentristo, muzikanto, sportemulo... Li ŝatas bicikli kaj tiamaniere li rapide iras proksime aŭ malproksime. Li ankaŭ ŝatas grimpi al altaj montaroj, unuvorte li ŝatas la Naturon kaj ĝuas ĝian belecon.

Mi volas ankaŭ diri kaj pri liaj interesoj al la muziko. Kie li iras, kiam vidas nekonatan de li muzikilon, li tuj ĝin aĉetas pri sia kolekto, sed ne nur tio – li ŝatas muziki kun ĝi.

Estas ankoraŭ io grava – li estas esperantisto kaj tio helpas al li havi multnombrajn geamikojn. Kaj ĉiu scias, ke la amikoj estas nia riĉeco.

Tiu talenta homo – Hori Jasuo - kun sia bona koro, kun la amo al la Naturo, devas esti modelo pri ĉiu. Estu li sana, ni atendos de li novajn pentraĵojn kaj historiojn, al kiuj ni ĝuu!

1. KATO SIN LAŬDAS



Ni sidis en la korto, kiam venis nia kato. Ĝi portis

muson kaj metis ĝin antaŭ la piedoj de mia bopatrino. Ŝi eksaltis kaj ekriis. Mi diris al la kato:



- Vi ja scias, ke nia avino timas de musoj. Prenu ĝin kaj foriru!

Poste ŝi demandis min: - Pro kio la kato faris tion?

-Ĝi volis laŭdi sin kiel bona ĉasisto ĝi estas kaj ne manĝas vane la nutraĵon.

-Sed, pro kio ĝi ne metis la muson antaŭ viaj piedoj? Mi ne povis respondi.

2. LUDU, KATO!



La birdoj volas ludi kaj invitas la katon:

- Kato, Venu ludi kun ni!

La kato estas timigita. Ĝin atendas fiŝmanĝado, ĉu ĝi lasos ĝin? Kiu diros kion ĝi faros?

(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio

4>> Arabaj Noktoj, ĝi sukcesis transiri al realisman stilon kun tridimensia profunda efekto surbaze de la disiĝo de la fonaj kaj antaŭaj figuroj. "Mia filmo "La aventuroj de princo Ahmet" estis finita en la jaro 1926. Fritz Lang ĉeestis ĉe la antaŭspektaklo de la filmo. Mi neniam vidis ion tian antaŭe. Ili aplaudis post ĉiu efekto, ĉiu sceno."

Lotte faris dekojn da filmoj dum siaj produktivaj jaroj en la 1930-aj jaroj. Ĉiufoje, li aldonis ion de si mem al la muzika linio. En 1935, ŝi malfermis sukcesan ekspozicion per siaj verkoj en Anglujo.

Kiam ŝia edzo Carl Koch iris al Francio por iom da tempo, Lotte decidis resti en Londono. Tie ŝi renkontis John Grierson, produktisto kiel ŝia edzo de GPO-filmproduktado. GPO petis, ke ŝi faru reklamon por Kristnasko. Post tio, Lotte kaj ŝia edzo ekvojaĝis

tra Eŭropo. Tamen en 1949 ili ekloĝis definitive en Londono.

"Mi komencis filmi por BBC kaj Usonaj Televid-Kanaloj. Mi estis preparinta tutan serion de ombroteatraĵoj por BBC. Poste ni komencis filmi la filmon "La Magia Ĉevalo" (The Magic Horse), kiu aspektis al la filmo de Princo Ahmet. Mia edzo kaj mi laboris konstante pri filmoj en la 1950-aj jaroj kaj neniam forlasis Londonon."

Post la morto de ŝia edzo Carl, Lotte komencis vojaĝi. Ŝi faris marionetojn por teatroj. Ŝi organizis laborejojn kaj konferencojn por junaj filmistoj.

Ŝi mortis en la jaro 1981. En 1999, la Brita Filmo Instituto komencis konservi kaj prezenti "La aventurojn de princo Ahmet" de Lotte en sia kolekto, por ke la estontaj generacioj povu spekti kaj ĝui ĝin kun la sama

admiro." (<https://www.mihrace.net/lotte/>)

Tiuj, kiuj konas la ombroteatron de "Karagoz" en Turkio kaj Grekio kaj la ombroteatron de Javo (Indonezio) eble ĝuos pli la filmon "La aventuroj de Princo Ahmet". Mallonge la temo de ĉi tiu adapto de fabeloj "1001 Noktoj" estas la jena: "La afrika malbona sorĉisto, kiu enamiĝis al Dinarsade, la bela filino de la Kalifo de Bagdado, kreas magian flugantan ĉevalon por impresi lin kaj persvadi lin al geedziĝo. La kalifo diras, ke se li donus tiun ĉevalon al li, li donus ĉion, kion li volus. La magiisto donas la magian flugantan ĉevalon kaj kompanse volas edziĝi kun Dinarsade, la filino de la Kalifo; sed la pli aĝa frato de Dinarsade, princo Ahmet, kontraŭas ĉi tion. La magiisto, kiu igas la magian flugĉevalon kontrabandi princon Ahmet al malproksimaj landoj intence, faras lian tutan malbonon tra la filmo, tiel ke Ahmet ne povu malhelpi lian geedziĝon. Alveninte sur la insulon de vak-vak animoj, princo Ahmet enamiĝas al Peri Banu unuavide. La ĉeno de eventoj daŭras kun la kidnapo de Peri Banu fare de la malbona sorĉisto kaj la luktado de princo Ahmet por savi ŝin kaj reveni al sia palaco.

Demonoj, Aladino kaj lia lampo, estaĵoj konstante

aliformiĝantaj kaj la fona muziko harmonie kun ĉi tiu atmosfero faras allogan ĉi tiun ombro-rakonton. Se vi pli amas marionetojn, liniojn, ombroludon ol normalaj rakontoj kun veraj aktoroj, vi raviĝos.

Char (Lotte) Reiniger iam diris:

"Mi kredas pli en la vero de fabeloj ol en la veroj en la gazetoj."

Konuralp Sunal

23-a de aŭgusto 2021

Buyukada insulo, Istanbulo – Turkio



4>> de filoj de laboristoj, kiuj vizitis la superan mezlernejon. Ne forgesu, ke tiam Eŭropo travivis periodon de rekonstruado materia kaj spirita post la Dua Mondmilito.

En tiu kadro, en la kvindekaj jaroj oni trovis la energion en la esperantistoj, kiuj estis parto de la ĉirkaŭa sampensa socio, por rekonstrui la Esperantomovadon. Ĉio ŝajnis ebla, kaj post la agnosko de Esperanto fare de Unesko en Montevideo komence de la 1950aj jaroj, multaj pensis, ke la fina venko jam venis. Lapenna estis granda gvidanto, sed ankaŭ la gvidatoj estis grandaj kaj pensis, ke ili povas vere influi la mondon. Neniu vere komprenis tiam en Okcidenta Eŭropo tion, kio estis ekokazanta, alivorte, ke la sinnomanta libera mondo eniras la usonan imperion, kio estas la fino de neŭtrala lingvo antaŭ la lingvo de la imperio, la angla. Sed tio fakte okazis. La agnosko de Unesko restis unu el tiuj belaj ideoj, pri kiu la libera mondo ridetis dum ĝi okupiĝis vere pri la lernado de la angla kaj la milionoj da subskriboj prezentitaj al UN estis trankvile ignorataj. Mi ekaktivis en la 1960aj jaroj, kaj mi kaptis la emociojn de tiu periodo. Mi mem vidis la maljunulinojn en la unua vico plori dum festparoladoj de Lapenna. Mi mem spertis la tiamajn esperojn, la senton pri progreso de la movado. Kiam UEA aĉetis la unuan kopi-maŝinon por fari fotokopiojn, tio fariĝis la ĉefa novaĵo en la dissendo de la tiama itala radio en Esperanto. Tian modernan movadon neniu antaŭe pensis ebla.

Mi travivis tuj poste la junularajn ribelojn kaj la renoviĝintajn esperojn de la tiamaj gejunuloj pri plia libereco en la socio kaj en la mondo. La tiama TEJO estis parto de la pli ĝenerala junulara movado kaj kun entuziasmo transprenis UEA-n de Lapenna, kaj pensis, ke per la novaj ideoj kaj la nova pli libera socia ordo ĝi povas porti la movadon antaŭen. Cetere, tiam la malkoloniĝa procedo progresis, kaj en TEJO naskiĝis la ideoj pri Esperanto en Afriko, kaj intertempe la venko de Vjetnamujo kontraŭ Usono ŝajnis la fino de imperiismo.

Ho ve! Ni ne komprenis tiam, ke la sociaj reformoj, la seksa libereco kaj similaj gajnoj de la junularaj ribeloj estis fakte nur supraĵaj aferoj, kaj ke la imperio intertempe firmigas sian regon kaj sian lingvon kaj kompatas idealistojn kiel nin.

La fina bato por UEA kaj la movado estis la kolapso de la Sovetunia sistemo. Post la morto de Stalin Esperanto prosperis en Orienta Eŭropo kaj en Soveta Unio, kaj la tiea movado ricevis ŝtatan helpon, kiun ĝi parte misuzis. Cetere, ideo Esperanto kongruis kun la tiamaj kaj tieaj teoriaj pensoj pri internaciismo. Neniu en la esperantista mondo komprenis, kian grandan baton por Esperanto portas la fino de la socialisma "tendaro". Kelkaj kaj en la Okcidento kaj en la Oriento eĉ pensis, ke en la novaj kondiĉoj de libereco Esperanto povos multe disvolviĝi. Ili estis viktimoj de la retoriko pri libereco per kiu la imperio kaŝis siajn celojn vastiĝi al alia mondoparto. La rezultoj

estas antaŭ la okuloj de ĉiuj: ne plu lernu la lingvon de la antaŭa imperio sed tiun de la nova, kaj Esperanto estas stultaĵo de mal-realistoj.

Mi komprenas, ke mi estas rakontanta mian tutan vivon. Mi provu resumi la aferon per unu frazo: la generacio de Lapenna konstruis fortan movadon, mia generacio malkonstruis ĝin aŭ almenaŭ ne komprenis, ke la malkonstruado estas okazanta, kaj ke ni povas fari nenion kontraŭ ĝi.

Mi aldonu ankoraŭ, tamen, unu aferon: en la 1960aj jaroj la esperoj pri granda kaj forta Eŭropo, kun apartaj trajtoj kaj kuntenanta socialismon kaj liberecon, estis grandaj kaj ŝajnis, ke Esperanto povos esti parto de tiu nova Paradizo. Vi ĉiuj povas konstati tion, kio okazis: Eŭropo estas periferia parto de la imperio kaj rezignus pri la lingvo de la imperio favore al Esperanto, nur se Usono ne ordonos tion al ĝi.

Ĉu la fervoro kaj esperoj de tiu periodo estas hodiaŭ ankoraŭ vivigeblaj? Se jes, kiel?

Pri Eŭropo kaj ĝenerale la Okcidento mi ne scias. Dum regos la punkto de ekstrema libermerkatismo, la homoj estas gvidataj for de ĉio, kio demandosignas la sistemon, eĉ de la problemoj pri pluekzisto de la mondo: ĉu ni pluproduku senutilaĵojn kaj detruu nian planedon? Jes, respondas la sistemo kaj pagas ĵurnalistojn kaj reklamistojn, kiuj konvinkas la popolon, ke tio estas la ĝusta respondo.

Kaj Esperanto demandosignas la sistemon de potencorilatoj en la mondo. Aliflanke mi vidas grandajn esperojn pri pliboniĝo de la viv-situacio en Afriko kaj Azio, aparte Ĉinujo, inter la homoj ĝenerale kaj sekve ankaŭ inter la esperantistoj. Se la ĉinaj esperantistoj decidus uzi la influon de la ĉina registaro favore al Esperanto, tio eble povus porti progreson. Mi ne vidas, kiu alia regiono de la mondo povas transpreni la torĉon de Eŭropo. Sed, atentu, tio postulas, ke ĉinaj esperantistoj forlasu sian pozicion de nur utiligado de Esperanto.

Vi insistas pri la informado. Se mi bone komprenas, laŭ vi la Esperanto-movado devus plene sin dediĉi al la informa agado, eĉ je la prezo de aliaj aktivadoj. Bonvolu klarigi en kelkaj frazoj kiel organizi tiun agadon, kiel devus aspekti perfekta Esperanto-informado?

Ni estas portantoj de revolucia ideo pri egaleco inter la popoloj, ideo, kiu ne kongruas kun la homa naturo, ĉar homoj emas sekvi sian avantaĝon kaj en nia kampo, lerni la lingvon de la plej fortaj. Kiel vi klarigas la ekeston, verdire ankoraŭ minimuman, de infanvartejoj en la ĉina en anglalingvaj landoj?

Do, estas klare al mi, ke, por ke Esperanto estu konsiderata akceptebla alternativa ideo inter la alternativaj ideoj de la malgranda alternativa parto de

la homaro, oni devas multe informi pri ĝi la homojn, ĉar la socia sistemo mem informas kontraŭ ĝi. Ni konsideru la ekzemplon de lando, kiun vi bone konas, ekzemple Pollando. De la mateno ĝis la vespero la televido kaj la aliaj informkanaloj kaj la faktaj labor-eblecoj sugestas al la homoj lerni la anglan. Por ke almenaŭ parto de ili turnu sian atenton al Esperanto oni devas fari kolosan klopodon. Ni ne havas la fortojn por tia kolosa klopodo. Ni estas formiko, kiu volas konvinki elefanton respekti malgrandajn bestetojn. Sed almenaŭ ni provu informi partojn de la socio, kiuj povas esti pli malfermaj al novaj aferoj.

Pri la praktika organizado de la movado mi diros nenion, ĉar la unua paŝo estas, ke esperantistoj konvinkiĝu, ke ili estas la postsekvantoj de Zamenhof, kiu lasis al ili la pezan heredaĵon konvinki la mondon pri la ideoj de egaleco inter la lingvoj, la kulturoj kaj la homoj. Do, la ĉefa problemo estas, ke ni konvinkiĝu, ke ni devas daŭrigi la agadon de Zamenhof kaj transdoni al la mondo liajn ideojn. Por citi nur unu konkretan ideon, Ludoviko kaj Klara, kiuj uzis ŝian doton por aperigo de la Unua Libro, certe dormus pli trankvile en siaj tomboj, se UEA dediĉus duonon de siaj enspezoj al informado pri Esperanto kaj la ideoj de Zamenhof kaj nur la alian duonon al liverado de servoj al la parolantoj. Kaj tio validas por ĉiuj landaj asocioj kaj ĉiuj lokaj grupoj kaj ĉiuj unuopaj esperantistoj.

Kiujn mezurilojn vi difinus por kontroli la efikecon de la informado? Kaj kiujn – realismajn! – celojn ni starigu por la proksimaj jaroj?

La nombro de homoj, kiuj lernas la lingvon, laŭ mi estas la plej bona mezurilo. El tiu vidpunkto Chuck Smith, kiu traktis kun Duolingo pri la kurso de Esperanto, devus ricevi statuon en la centra placo de Bjalistoko.

Realisma celo: UEA havu estraron, kiu komprenas la gravecon daŭrigi la taskon de Zamenhof.

Kiam vi esperantistiĝis meze de la 1960aj jaroj, la Centra Oficejo de UEA jam nestis ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. Jam de jaroj vi insistas, ke ĝi devus ŝanĝi sian adreson kaj transloĝiĝi al “malpli kosta” lando. Mi havas impreson ke via propono havas pli da ŝancoj nun, kiam la asocio estas mallerte gvidata. Sed ĉu tiu paŝo vere povus savi la asocion aŭ ĝi definitive sinkigus la nun drive flosantan asocion?

La sidejo en Roterdamo havis sencon en la 1950aj jaroj, sed jam en la 1960aj jaroj la kostoj komencis iĝi tro altaj. Tiam entuziasmaj esperantistoj volis transporti la sidejon al Bruselo, la nova eŭropa ĉefurbo. En la lastaj jardekoj mi ĉiam insistis ke ĝi devus esti en pli malmultekosta lando kaj mi daŭre estas konvinkita pri tio, sed la loko de la sidejo estas,

laŭ mi malgrava ol la ideoj pri agado, pri kiuj ni abunde diskutis. Movo al Slovakujo, pri kiu oni parolas nun, ne estas laŭ mi malbona, sed movo al Afriko aŭ rekte al Pekino estus ankoraŭ pli bona. Eblus ankaŭ kombini sidejojn en Slovakujo, Afriko kaj Pekino por malsamaj celoj, sed tion ni lasu al pli junaj homoj.

Kiel la kronviruso influas la Esperanto-movadon? Kompreneble, homoj mortas aŭ perdas siajn enspezojn, ekhavas aliajn problemojn – tio tuŝas ankaŭ esperantistojn kiel individuojn. Sed kio pri la movado?

Ŝajne ni superis ĝin same bone kiel la cetera mondo kaj eĉ pli bone.

Ni ankoraŭ devas plene adaptiĝi al la nova situacio, kaj kiel ĉiuj aliaj ni esperas ke post la pandemio ĉio refunkcios kiel antaŭe. Tio espereble ne estos vera pri la mondo ĝenerale, kiu devus kompreni, ke oni ne povas riĉiĝi senfine kaj detruiri la planedon, ke simple estas trompo promesi al ĉiuj, ke ili povas iĝi milionuloj nur se ili zorgas pri siaj egoismaj interesoj kaj malatentas pri la malriĉuloj, tiuj malfavoratoj de Dio, kiel pensis la protestantoj.

Sen vojaĝoj, sen kongresoj, sen vivaj kontaktoj – ĉu tio endanĝerigas nin aŭ vi vidas novajn ŝancojn en la interretaj – ne apudaj, sed anstataŭaj – instruado kaj kongresado?

La Esperanto-movado same devos lerni vivi alimaniere, sen aviadilaj vojaĝoj al la alia flanko de la mondo. La teĥnologio montris al ni, ke ni povas. Ekzemple la Londona klubo, kiu elspezis multegon por permesi al 15 homoj kunveni ĉiun duan semajnon, eble devos lerni vivi kun malpli multaj personaj renkontiĝoj kaj kun pli da retaj kunvenoj. Neniam kiel dum la pandemio ni havis tiom da lernantoj kaj la retaj kursoj montriĝis efikaj.

Do, mi fidas, ke la movado elvenos el ĉi tiu periodo pli rezistokapabla ol antaŭe. Ni ne forgesu, ke niaj patroj aranĝis kursojn pri Esperanto en koncentrejoj. Ĉu ni ne sukcesos travivi esence pli facilan situacion?

Kaj kiel vi nun esperantumas?

Mi esperantumas bone. Vendrede la Londona klubo aranĝas retajn prelegojn kun amaso da partoprenantoj. kaj en la aliaj tagoj mi respondas mesaĝojn kaj instruas rete. Aparte plaĉa por mi estas kurso por azianoj, el kiuj mi lernas vere multon pri iliaj problemoj lerni Esperanton, kaj pri iliaj kulturoj.

Vi estis prezidanto de Itala Esperantista Federacio, de TEJO kaj UEA, sekretario de la Akademio de Esperanto, entute vi okupis plurajn rolojn kaj ĉiam vi estas tre aktiva en la movado. Pri kiu via agado vi estas plej kontenta? Kion vi nomus via plej granda sukceso?

Mia sukceseto estis la disvastigo de la ideo, ke Esperanto estas lingvo por la mondo kaj ke UEA devas pensi pri si mem kiel monda organizaĵo kaj aranĝi UKojn en ĉiuj mondopartoj kaj mia alia sukceseto nomiĝas Hans Bakker, la homo, kiu tutsola esperantigis kontinenton, Afrikon. Li estis komisiito de UEA pri agado en Afriko kaj koresponde instruis Esperanton al multegaj afrikanoj. Tiel komenciĝis la moderna movado por Esperanto en Afriko. Miaj grandaj malsukcesoj estas la malkapablo interesi UEAn pri tio, ke ĝi devas disvastigi Esperanton, produkti esperantistojn kaj ne nur servojn por esperantistoj. Produkti esperantistojn estas io tre pli malfacila. Kaj la dua malsukceso estis konvinki sufiĉe da esperantistoj paroli pli simplan lingvon, kiun ĉiu aziano povas kompreni. Eŭropaj esperantistoj rezignos pri siaj privilegioj nur kiam ili estos devigataj.

Antaŭ kelkaj jaroj vi transloĝiĝis kun la familio el Italio al Britio. Vi aktive kaj fervore ekagis en Londono. Ĉu vi bone retrovis vin en la nova loko? Kio mankas al vi el Italio?

Mi mem neniam transloĝiĝus al lando kun la neFundmaneta finaĵo -io. Mi transloĝiĝis al Britujo kaj nature tre bone rilatis kun la lokaj esperantistoj kaj kunlaboris kun ili. Tio, kio mankas al mi el Italujo estas la ĉielo. Pri ĉio cetera oni povas trovi anstataŭaĵojn.

Intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**

Legu pli pri Renato Corsetti en la enciklopedio Nia diligenta kolegaro, paĝoj 60-62.


Ĉi tiu intervjuo aperis en la printempa (marta) numero de La Ondo de Esperanto (2021).

Fonto: **La Ondo de Esperanto**

<https://sezonoj.ru/2021/03/corsetti-3>



Solvo de la krucvortenigma



El la libro „Dějiny budou od úterý“

(La historio komenciĝos de mardo)
– Pavel Landa, traduko J. Drahotová

Alternativo

En sufiĉe bela somero en la jaro 2002, dum nia lando suferis por egaj inundoj, mi aŭdis kelkajn memsavigajn anekdotojn, kiuj ĉiam niaj homoj abunde kreas dum tempoj de katastrofoj. Ĉi tie vi legu la puran „judan“:

Eta David demandas: „Avĉjo, kio estas alternativo?“

„Nu, imagu al vi, ke vi aĉetos kokinin. Ĉiutage ŝi donos al vi ovon. Kompreneble vi aĉetos duan. Kaj vi ekhavos ĉiutage du ovojn. Vi aĉetos dek kokinojn kaj ili donos al vi ĉiutage dek ovojn.“

„Do bone. Sed kio estas alternativo?“

„Vi lernas, vi akiras superrigadon en ovonegoco. Do, vi aĉetos cent, ducent, kvarcent kokinojn kaj vi ekhavos ĉiutage kvarcent ovojn.“

„Avĉjo, sed kio estas alternativo?“

„Vi prosperas, vi kreas farmon kokinan kun mil kokinoj. Poste duan, trian, kvaran, vi havos dek du homojn da personaro kaj ĉiutage kvarmil ovojn. Ĉu vi povas tion imagi? Sed poste venos inundo kaj post dek kvin minutoj ĝi ĉion forprenos.“

„Terure! Sed avĉjo, ne ĉagreniĝu, kio estas alternativo?“

„Anasoj.“

Inklino al ludo kun infanfervojo

Laŭ hipotezo de mia amiko Mirek Jenšík la kreo de nia respubliko okazis jene:

La 28-a usona prezidento Thomas Woodrow Wilson ŝatis, do amis ludilon - infanfervojon. En Blanka domo li ekpilis specialan ĉambron apud fama „Oval Office“, kiu pli poste estis konvena por petoli kun staĝantinoj. Sed en la tempo de Wilson estis tie tute nenio krom vasta relaro sur la planko kun aro de komutiloj, semaforoj, haltejoj kun turniloj, kvar tuneloj, du pontoj kaj kelkaj seneliraj reloj. En tiun ĉi ĉambron, antaŭ la publiko severe gardanta, la prezidento enradis ludi ĉiam, kiam li estis laca (plena de ĉio ĝis la kolo, kiel diras ĉeĥoj), do okazo ofta por homo sur tiel alta posteno.

Pri tio sciis (kiel ĉiam pri ĉio) la bone informita profesoro Masaryk. Kaj kiam li sukcesis finfine akiri inviton al privata vizito, Masaryk lotmetis sur fervojan karton.



„Estimata sinjoro prezidento,“ diris Masaryk, sidetante en luksa seĝo, „mi venas kun ĝentila peto. Mia kolego, doktoro Beneš, eble vi memoros lin, kun iomete malglata angla, sed alie deca homo, havas en la kapo ideon – Ĉeĥoslovakian respublikon. Pri io alia li ne volas konversacii. Ni devas fari por li respublikon, alie li estus nervoza, malserena. Do, mi venis vin peti, ke vi per via vorto helpu. Ni sendus al vi iajn dokumentojn kaj viaj sinjoroj kontrolos ilin. Koncize: Sinjoro prezidento Wilson, helpu al ni krei respublikon, je tio ni donos al vi en Prago la ĉefan stacidomon!“

Amiko Jenšík asertas, ke eble tiel ekestis Ĉeĥoslovakio.

Rakonto pri Nenio

Mi renkontiĝis hieraŭ vespere sur la ponto kun Nenio. Ĝi iris sola, ŝajne promeni.

„Pardonu,“ mi diras, „ĉu mi povas akompani vin iomete?“

„Kial ne,“ ĝi diris kaj belete ekridetis.

„Ĉu mi ne ĝenus vin,“ mi daŭrigis la paroladon, „se mi enketus vin per kelkaj demandoj? Mi ja volas pri vi verki artikolon.“

„Artikolon?“ subite ĝi aspektis lacega. „Denove pri mi?“

Kaj kun longa oscedo ĝi disigis sin en sia esenco.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotová